To wszystko nam się po prostu należy. Nie znamy umiaru. Chcemy wszystkiego.

Ponad sto lat temu ludzie mieli finał wielkiej wojny i epidemię hiszpanki. Zrozpaczeni zapewne myśleli, że ich świat się kończy.

Nasz świat, taki jaki jest, przygoda człowiecza, też się kończy. Czy skończy się tak, jak w tytułowym utworze zbioru A. Ginsberga? Lub w wierszu „Wydrążeni ludzie” Th. S. Eliota?

Bardzo, bardzo chciałabym, żeby jeszcze zaświeciła dla nas tęcza po burzy, mała, zielona gwiazda liścia, nadzieja... Jesteśmy jej warci? Przyfrunął spokój i uśmiech. Wiara... w co? Żeby nie zgubiono całego dobra i pociechy, piękna i wagi sztuki... Bardzo, bardzo chciałabym...

„Zaklinanie, czarowanie...” Rozum, ogląd świata, logika podpowiadają co innego.

Interparolo pri estonteco kun rememoro pri estinteco dum kongreso pri trafiko

La 21-an aprilo 2151 okazos en unika malgranda ĉeĥa urbeto kunveno de trafikaj specialistoj. Unu prelego temos pri specioj de trafikaj rimedoj – trajnoj, kiujn ni nun povas renkonti en refreŝiĝaj lokoj. Kunvenon partoprenos memorulo Josef Novák, kiu alflugis jam hieraŭ. Sinjoro Novák festis ĉijare sian 150-an naskiĝdatrevenon kaj hodiaŭ dediĉis intervjuon al redaktoro el fama magazino Espero. Por informo – la aĝo 150 jaroj ne estis normala en 21-a jarcento. Homoj mortadis en tiu tempo pli frue pro malbona aero kaj venenaj gasoj el motoroj de veturiloj.

Kaj nun ni iru al intervjuo:

Redaktoro: Bonan tagon, komence mi volas gratuli vin por via grava datreveno kaj mi deziras vin gardi multe kaj multe da sano, kiun vi akiris en tempo, kiam robotoj helpis al kuracado en lasta jarcento. Mi volus demandi vin pri via opinio – kia estas grava kialo de trafika ŝanĝo en tempo de la 21-a jarcento kaj kiel ĉio komenciĝis?

Novák: Ĉio komencis en la jaroj 2020–2025. En tiu tempo multege da homoj malsaniĝis je nekonataj malsanoj, komenciĝis problemoj en ekonomiko. Estis bezonata ŝanĝo de fontoj de energio ĉefe en industrio. La homoj komencis observi, ke halto de aera trafiko kaŭzis, ke aero pli-boniĝis kaj homoj malpli malsaniĝis. Regis ankaŭ timo pri robotoj sur planedo. En pratempo influis progreso, kiu okazis en malgranda lando en centra Eŭropo. Evoluigis fabrikado de aŭtomobiloj kun elektra mov-

forto kaj poste aerkusenaj veturiloj, kiuj uzis energion de homa cerbo. En tiu tempo homoj uzis nur 20 procentojn de cerba potenco, sed novaj veturiloj postulis cent procentojn de potenco de homa cerbo. Homaj cerboj ofte estis detruitaj. Potencon de robotoj ekuzis sanzorgaj institutoj, higienaj servoj. Niaj fakuloj ne kapablis fabriki robotojn kun pli efika homa cerbo, sed sciis transformi robotojn al fakuloj zorgantaj pri de homoj.

Redaktoro: Mi komprenas, ke aŭtomobiloj, busoj kaj aviadiloj malaperis el homa trafiko kaj mi ne komprenas kial restis trajnoj?

Novák: Trajnoj estis iomete specialaj veturiloj en tia tempo: ili veturis sur reloj, ofte bezonis elektran forton. Ili estis pli ekologiaj ol aŭtomobiloj. Similaj al trajnoj estis ankaŭ liftoj kaj telferoj kaj ili servas ĝis hodiaŭ.

Redaktoro: Mi komprenas, ke aerkusenaj veturiloj venkis trajnojn en 1-a duono de 21-a jarcento, sed mi ne komprenas, kial haltis ilia disvolviĝo?

Novák: Tiu tempo estis tre pretendema kaj komencis aperi multege da trajnaj societoj sed mankis mono por riparado de stacidomoj kaj reloj. En tuta lando regis ĥaoso en ĉiuj flankoj de homa vivo, eĉ en popola trafiko.

Redaktoro: En kioma jaro naskiĝis ideo pri fondo de via societo de refervojistoj?

Novák: Tio okazis post la jaro 2050. En tiu tempo komencis efiki pura aero. La homoj ekveturis per aerkusenaj veturiloj. Ŝanĝiĝis ilia grandeco. Ili aspektis kiel busetoj kaj gepatroj timis lasi konduki ilin al siaj infanoj. Kapabloj de infanoj estis tamen pli spertaj ol de gepatroj. Oni aĉetadis tiaj veturiloj por infanoj prefere por junularo. Baldaŭ trajnoj regule funkciis en turismaj lokoj, ĉar tie aera spaco estis tro ŝarĝita per aerkusenaj veturiloj. Trajnvagonoj havis verdan koloron, kiel signo por amikoj de ŝatata internacia lingvo. En tiuj trajnoj oni povis paroli Esperanton, ĉar ĉiam almenaŭ unu esperantisto kunvojaĝis.

Redaktoro: Tio estas grandioza kaj mi esperas, ke ni ĉiuj kunvenos en viaj verdaj trajnoj. Ĉu vi estas ankaŭ instruisto de Esperanto?

Novák: Jes, kaj scio de Esperanto tre helpis al mi por realigo de miaj planoj kaj deziroj, mi ne bezonis havi nur elektronikon por interkompreniĝi sed per Esperanto mi povis paroli kun homoj el la tuta mondo. Scio de Esperanto estis en 21-a jarcento tre populara. Nun mi petas ĉiujn partoprenatojn de kongreso parkumi siajn aerkusenajn veturilojn sur herbejo. Hodiaŭ je la 14-a horo alveturos 10 verdaj retrajnoj por 10 km-a ekskurso. Ĉiuj partoprenantoj ricevos verdajn enirbiletojn, kiuj aspektas kiel infana lokomotivo. Tiaj trajnetoj estis ankaŭ amuzaj ludiloj en mia infaneco. Mi deziras vin feliĉan vojon per trafiko de estinteco.

Redaktoro: Mi dankas al vi, fartu bonege kaj multe da sano kaj feliĉo al vi.

Rozmowa o przyszłości z myślą o przeszłości w czasie kongresu na temat ruchu drogowego

21 kwietnia 2151 odbędzie się w nietypowym małym czeskim miasteczku spotkanie specjalistów od ruchu drogowego. Jedną z prelekcji będzie dotyczyła pociągów jako rodzajów transportu, który można spotkać w kurortach. W spotkaniu uczestniczył „pamiętliwy” Josef Novák, który przybył samolotem już wczoraj. W tym roku pan Novák obchodził swoje 150-te urodziny i dzisiaj da wywiad redaktorowi znanego dziennika „Espero”. Tak na prawdę dożycie 150 lat nie było czymś normalnym w XXI wieku. Ludzie umierali dotąd wcześniej z powodu zanieczyszczenia powietrza i trujących gazów z pojazdów mechanicznych.

Przejdźmy do wywiadu:

Redaktoro: Dzień dobry! Najpierw pragnę pogratulować panu z okazji ważnych urodzin. Życzę wiele, wiele zdrowia, które zachował pan od ostatniego stulecia, kiedy to roboty pomagały w leczeniu. Chciał-

bym zapytać o pana zdanie: jaka jest ważna przyczyna zmian w ruchu drogowym w XXI wieku i kiedy wszystko się zaczęło?

Novák: Wszystko zaczęło się w latach 2020 – 2025. W tym czasie mnóstwo ludzi zachorowało na nieznane choroby, zaczęły się problemy natury ekonomicznej. Potrzebna była zmiana źródeł energii – głównie w przemyśle. Ludzie zaczęli spostrzegać, że powstrzymanie transportu powietrznego spowodowało poprawę jakości powietrza i ludzie mniej zapadali na choroby. Pojawił się strach przed robotami na planecie. W zamierzonych czasach wpływ miał postęp techniczny Środkowej Europy. Rozwinęła się produkcja samochodów elektrycznych, a potem latających poduszkowców, używających energię ludzkiego mózgu. W tym czasie wykorzystywano tylko 20% tej energii lecz nowe pojazdy wymagały użycia nawet 100% energii mózgu. Mózgi ludzkie często ulegały zniszczeniu. Siłą sprawczą robotów wykorzystwały beztroskie instytuty i instytucje świadczące usługi higieniczne. Nasi specjaliści nie potrafili stworzyć robotów z wydajniejszym ludzkim mózgiem, a jedynie przerobić roboty na specjalistów ds. zdrowia publicznego.

Redaktor: Rozumiem, że samochody osobowe, autobusy i samoloty wyeliminowano z ludzkich środków transportu lecz nie rozumiem jak to się stało, że pozostały pociągi?

Novák: Pociągi w tym czasie były w jakiejś mierze specjalnymi pojazdami. Poruszały się po szynach, często potrzebowały elektrycznego napędu: były bardziej ekologiczne niż samochody osobowe. Podobny do pociągu typ stanowiły windy i kolejki linowe, które działają do dzisiaj.

Redaktor: Rozumiem, że poduszkowce pokonały pociągi w pierwszej połowie XXI wieku lecz nie rozumiem dla czego dalszy ich rozwój został wstrzymany.

Novák: Ten okres był bardzo „pretensjonalny”. Żywiołowo powstawały firmy zajmujące się transportem kolejowym. Brakowało pieniędzy na remonty dworców oraz szyn. W całym świecie chaos rozpanoszył się w każdej dziedzinie ludzkiego życia, nawet w ogólnodostępnym ruchu drogowym.

Redaktor: W którym roku pojawił się pomysł założenia Stowarzyszenia Powtórnych Kolejarzy?

Novak: To wydarzyło się po roku 2050. Wtedy to rozpoczęła się era czystego powietrza. Ludzie zaczęli podróżować poduszkowcami. Zmieniła się ich wielkość. Pojazdy wyglądały jak autobusiki i rodzice obawiali się prowadzenia tych pojazdów przez dzieci. Okazało się jednak, że dzieci nabywały zdolność prowadzenia szybciej niż rodzice, więc kupowano je dla pociech, głównie dla młodzieży. Wkrótce do miejsc turystycznych regularne kursowały pociągi, ponieważ przestrzeń powietrzna została zdominowana przez poduszkowce. Wagony pociągów miały kolor zielony jako znak dla przyjaciół ulubionego międzynarodowego języka. W tych pociągach można było rozmawiać w języku Esperanto, ponieważ był tam zawsze minimum jeden esperantysta.

Redaktor: To wspaniale. Spodziewam się, że wszyscy spotkamy się w waszych zielonych pociągach. Czy jest Pan także nauczycielem języka esperanto?

Novák: Tak, a znajomość Esperanta bardzo pomogła mi w realizacji moich planów i pragnień. Nie potrzebowałem wyłącznie elektroniki do kontaktów. Przy pomocy Esperanta mogłem rozmawiać z ludźmi z całego świata. Znajomość Esperanta w XXI wieku była bardzo popularna. A teraz proszę wszystkich uczestników Kongresu o zaparkowanie swoich poduszkowców pod drzewami. Dzisiaj o godz. 14.00 przybędzie 10 zielonych specjalistycznych pojazdów aby zabrać nas na 10-kilometrową wycieczkę. Każdy z uczestników otrzyma zielony bilet wstępu wyglądający jak dziecinna lokomotywa. Takie minipociągi były w moim dzieciństwie ulubionymi zabawkami. Wszystkim życzę szczęśliwej podróży do przeszłości.

Redaktor: Dziękuję Panu! Wszystkiego dobrego! Pomyślności, zdrowia i szczęścia!

Z esperanta tłumaczyła Elżbieta Karczewska

Kial mi tempovojaĝas

Se vi demandus al mi, kiam mi lastfoje uzis mian tempomaŝinon, mia respondo estus: „Ĉiam”. Ĉar, se miaj lastatempaj spertoj kiel tempovojaĝanto instruis al mi ion ajn, estas tio, ke ĉiuj niaj agoj estas interkonectitaj; ke ĉio, kion ni faris, faras kaj faros fandiĝas en nedisigebla maŝo el iso, aso kaj oso.

Se vi tamen demandus al mi kial mi lastfoje uzis mian tempomaŝinon (aŭ „tempumis”, en mia memelpensita ĵargono), tiukaze la respondo estus pli facila: pro amo. Pro mia Eva. Ĉu mi rajtas nomi ŝin „mia”? Nu, mi ne certas, sed mi ja sentas ŝin tia.

De longa tempo – mi fakte ne scias kiom, sed al mi ĝi ŝajnas longa – mi vojaĝas pasintecen nur por vidi ŝin, por viziti ŝin, por lerni ĉion pri ŝia vivo. Foje mi sidas sur benko kaj rigardas ŝian hejmeniradon (mi ja perfekte scias laŭ kiu vojo ŝi marŝos kaj je kioma horo); foje mi ŝajn-akcidente karambolas kun ŝi surstrate nur por havi la okazon pardonpeti; kaj foje mi gvatas ekster ŝia domo revante, kovante planon por konatiĝi kun ŝi.

La afero ial neniam sukcesas al mi. Plej ofte kiam mi alproksimiĝas al ŝi, ŝi eĉ ne rimarkas min, kaj preterpasas min kvazaŭ mi eĉ ne ekzistus. Unu fojon mi sukcesis konversacii kun ŝi sufiĉe longe, sed je la fino ŝi kvazaŭ forkuris de mi, verŝajne timigita de mia insista sinteno kaj troa amavido.

Ho, mi scias, ke mi eble ŝajnas esti kompatinda, revema bubo, soifa je tia amo kian li neniam atingos; aŭ eĉ pli malbone, eble mi impresas

kiel fiaĉa, lasciva mensmalsanulo kiu ne povas ekkompreni, ke virino ne amas lin! Sed sciu, ke antaŭ ol mi tempumis la unuan fojon, Eva estis mia edzino de pli ol dek jaroj, kaj ni estis kunlaborantoj pri la tempomaŝino.

Mi ankoraŭ ne scias kion mi senintence ŝanĝis dum mia unua, mallonga prov-vojaĝo en la pasintecon. Mi simple tempumis dudek jarojn pli frue, por vidi kiel nia urbo ŝanĝiĝis de tiam, kaj restis tie nur kelkajn minutojn; mi alparolis neniun, tuŝis nenion, kaj miascie faris nenion, kio iel ajn tuŝus nian tiaman vivon. Tamen, kiam mi revenis nunen kaj eliris triumfe el la tempomaŝino, preta por rakonti al ŝi, ke nia eksperimento ja sukcesis, ŝi ne plu estis tie atendante min. Mi priserĉis la tutan domon kaj ne trovis ŝin, kaj fakte rimarkis eĉ ne spuron de ŝia ekzisto en nia domo. Mi finfine ekkonsciis pri tio, ke ial, en ĉi tiu nova nuno, Eva kaj mi neniam geedziĝis. Mi sukcesis ekscii ŝian telefonnumeron, sed kiam mi kontaktis ŝin, ŝi havis nenan ideon pri kiu mi estas: mi estis por ŝi absoluta fremdulo.

Mi do provis korekti la situacion vojaĝante denove en la pasintecon, unue al la momento kiam Eva kaj mi konatiĝis. Temis pri sufiĉe banala renkontiĝo en universitata librovendejo, sed, mi ne scias kial, la tiama mi-o ne estis tie. Mi decidis kontakti mian memon en la pasinteco por klarigi al li kio okazis (nu, okazos). Kompreneble li (ĉu mi?) estis tre surprizita kaj nekredema dekomence, sed finfine mi konvinkis lin kaj li promesis provi ĉiel ajn enamigi Evan.

Mi donis al li kiel eble plej multe da informo pri nia kuna vivo: kiel ni instruis fizikon en la sama fakultato; kiel ni geedziĝis post du jaroj en intima ceremonio; kaj finfine kiel post nelonge ni forlasis niajn postenojn por plu esplori niajn ideojn pri tempo-manipulado. Ni ambaŭ estis tre ambiciaj kaj pasiaj pri fiziko, kaj ni fordonis multajn jarojn cele al la realigo de nia revo esti la unuaj sciencistoj kiuj malŝlosis la sekretojn de la tempofluo. Ni elektis ne pensi ankoraŭ pri infanoj – ja estos tempo por tio kiam ni sukcesos, ĉar tiam, la tuta tempo estos nia.

Mia tiama mi-o ankaŭ lernis ĉion pri Eva: kiujn tiamajn ŝlagrojn ŝi plej amis; en kiuj anguloj de la biblioteko ŝi pasigis sian tempon legante

pri teoria fiziko; kaj eĉ kiel ŝi mendis sian kafon („nur iomon da lakto kaj tri gutojn da mielo, mi petas!”). Tamen, malgraŭ tiom da informo, liaj provoj en la pasinteco neniam prosperis al li, kaj mi restis en la nuno senespere sen Eva. Ĉu eble troa scio pri la estonto ruinigis dekomence ajnan burĝonantan amrilaton?

Mi finfine konvinkiĝis, ke estas vane provi reenigi en ŝian vivon. Mi ne povas malnodi la interplektitan aron de okazaĵoj kiuj efikas kaj kontraŭefikas unuj kontraŭ la aliaj en tute neantaŭvidebla ĥaoso el eĥoj kaj reeĥoj. Tial, nun (ĉu nun? aŭ ĉu ĉiam?) mi decidis fari lastan tempumon – ĉi-foje por provi detruigi la tempomaŝinon en la pasinteco, kaj malokazigi tiun fatalan unuan prov-vojaĝon. Parto el mi scias, ke ajna tia klopodo estas vana: kio okazis, tio okazas kaj okazos. Tamen, kion alian mi faru? Nuno sen Eva ne estas nuno, sed nulo.

Do, se vi legas ĉi tiun leteron, kiun mi postlasis en la kelo de nia domo – nia iama eksperimentejo – mi plej verŝajne malsukcesis pri mia plano. Mi ne scias kie mi estas, aŭ kiam mi estas, aŭ eĉ ĉu mi estas. Sed, espereble kiam ajn mi estas, mi estas kun Eva... kaj se mi ne estas kun ŝi, mi prefere estu neniam ajn.

Dlaczego podróżuję w czasie

Gdybyś mnie zapytał kiedy po raz ostatni użyłem mojej czasolotni moja odpowiedź byłaby „Zawsze używam”. Jeśli moje ostatnie doświadczenia jako podróżnika w czasie uczą mnie czegoś to oznacza, że wszystkie nasza działania są z sobą połączone; że wszystko, co robiliśmy, robimy i będziemy robili łączy się w niepodzielną pętlę przeszłości, teraźniejszości i przyszłości.

Gdybyś jednak zapytał mnie dlaczego ostatnimi czasy użyłem mojej czasolotni (a może kiedy „przemieszczałem się w czasie” mówiąc

w moim własnym slangu) to odpowiedź byłaby łatwa: z powodu miłości. Z powodu mojej Ewy. Czy mam prawo nazywać ją „moją”? Nie jestem pewien, ale tak ją odbieram.

Od dłuższego czasu – nie wiem jak długo, ale wydaje mi się, że bardzo – wracam do przeszłości aby ją odwiedzić, aby dowiedzieć się wszystkiego o jej życiu. Czasem siedzę na ławce i przyglądam się jej powrotowi do domu (wiem doskonale jaką drogę wybiera i o której godzinie), czasem udając przypadek zderzam się z nią na ulicy tylko po to, aby mieć powód do przeprosin, a czasem czaję się koło jej domu marząc i pielęgnując plan zapoznania się z nią.

Z jakiegoś powodu nigdy nie udało mi się zrealizować mojego planu. Najczęściej, kiedy zbliżam się do niej, nawet mnie nie dostrzega. I przechodzi obok, jakbym w ogóle nie istniał. Raz udało mi się porozmawiać z nią relatywnie długo, ale w końcu prawie uciekła ode mnie prawdopodobnie przestraszona moją natarczywością nadmiernymi przejawami sympatii.

Ho, wiem, że może wydają się godnym współczucia marzącym urwisem spragnionym osoby niedostępnej; albo jeszcze gorzej, może sprawiam wrażenie paskudnego, lubieżnego pomyleńca nie potrafiącego zrozumieć, że kobieta go nie kocha! Mimo wszystko zrozum, że kiedy poraz pierwszy przenieśliśmy się w czasie, Ewa była moją żoną od ponad 10 lat i byliśmy partnerami konstruującymi czasolotnię.

Dotąd nie wiem co zmieniłem bezwiednie w czasie mojej pierwszej, krótkiej, próbnej podróży w przeszłość. Po prostu cofnąłem się o 20 lat, aby zobaczyć jak zmieniło się w tym okresie miasto i pozostałem w nim kilka minut. Nikogo nie zagadnąłem, niczego nie dotknąłem i według mojej wiedzy nie zrobiłem niczego, co mogłoby dotyczyć naszego ówczesnego życia. Mimo to, kiedy wróciłem do współczesnego życia i triumfalnie wysiadłem z czasolotni gotowy opowiedzieć Ewie, że to udany eksperyment, nie spotkałem jej oczekującej mnie. Przeszukałem cały dom i nie znalazłem jej. Faktycznie nie zauważyłem nawet śladu jej istnienia w naszym domu. W końcu zrozumiałam że z jakiegoś

powodu w tej nowej rzeczywistości nigdy nie byliśmy z Ewą małżeństwem. Zdobyłem jej numer telefonu, ale kiedy się dodzwoniłem nie miała pojęcia kim jestem. Byłem dla niej totalnie nieznaną osobą.

Tak więc spróbowałem naprawić sytuację udając się znów w przeszłość do chwili, w której poznaliśmy się z Ewą. Sprawa dotyczyła banalnego spotkania w uniwersyteckiej księgarni, ale z jakiegoś powodu moje „byłe ja” nie było tam obecne. Zdecydowałem się na kontakt z moim „byłym ja” w przeszłości aby mu wytłumaczyć co się wydarzyło (no, co się wydarzy). Oczywiście „byłe ja” (a może ja?) był bardzo zaskoczony i początkowo niedowierzający, ale w końcu przekonałem go i obiecał podjąć próbę pokochania Ewy w każdy możliwy sposób.

Dostarczyłem mu możliwie najwięcej informacji o naszym wspólnym życiu: jak wykładaliśmy fizykę na tym samym wydziale, jak pobraliśmy się po 2 latach w czasie skromnej uroczystości, jak w końcu porzuciliśmy naszą pracę aby poświęcić się bez reszty realizacji naszych ideałów związanych z manipulowaniem czasem. Oboje byliśmy bardzo ambitnymi pasjonatami fizyki. Poświęciliśmy wiele lat realizując marzenie pozostania pierwszymi naukowcami, którzy odkryli sekret upływu czasu. Ustaliliśmy, że jeszcze nie będziemy myśleli o dzieciach. Przyjdzie na nie czas po osiągnięciu sukcesu, ponieważ wtedy cały czas będzie należał do nas.

Moje ówczesne „byłe ja” również uczył się wszystkiego o Ewie: jakie szlagiery z tego okresu uwielbiała, w którym kącie biblioteki spędzała czas czytając o teorii fizyki, a nawet w jaki sposób zamawiała swoją kawę („tylko troszeczkę mleka i 3 krople miodu proszę”). Jednak, pomimo tylu informacji jego próby sukcesu w przeszłości nic mu nie dały i tak pozostałem w codzienności: zdesperowany i bez Ewy. Czy to możliwe, że zbyt duża wiedza o przeszłości rujnowała w zarodku jakiegokolwiek rodzące się uczucie?

W końcu przekonałem się, że nie ma szans próba powrotu do jej życia. Nie mogłem rozwiązać zbiegu okoliczności które w rezultacie spowodowały i udaremniły reakcje powodując jedne wydarzenia przeciwko

drugim w niemożliwym do przewidzenia chaosie odgłosów I pogłosów. Tak więc, teraz (czy teraz? A może zawsze?) zdecydowałem się odbyć ostatnią podróż w czasie – tym razem po to, aby zniszczyć czasolotnię w przeszłości I anulować tą fatalną pierwszą próbną podróż. Część mnie wiedziała, że te starania są bezskuteczne: co się zdarzyło to się wydarza i wydarzy. Jaki jednak miałem wybór? Codzienność bez Ewy to nie codzienność lecz nieistnienie.

Tak więc, jeśli czytasz ten list pozostawiony w piwnicy mojego domu – naszym ówczesnym laboratorium – to by znaczyło, że mój plan się nie powiódł. Nie wiem gdzie jestem, w jakim czasie jestem, nawet czy w ogóle istnieję. Lecz, miejmy nadzieję, że kiedykolwiek funkcjonuję – jestem z Ewą... a jeśli nie jestem z nią, to lepiej żeby mnie nie było nigdzie.

Z esperanta tłumaczyła Elżbieta Karczewska

Senŝanĝuloj

Ŝajne ĉio estas ŝanĝo. Trejnistoj diradis, ke tio, kio nur estas certa en la mondo, estas ke ni ĉiam devas preti por ilia apero kaj akcepto de ili. Tio, kiel ni perceptas la mondon dependas nur de ni. Videblas, ke iliaj mensoj ne permesas akcepti nekontesteblan stabilecon. Ja ekzistas principoj, kiuj simple estas kiel matematikaj reguloj, ili estas elementoj de la mondo aŭ laborkampo. Probable ili neniam renkontis Senŝanĝulojn. Eĉ se ili renkontis ilin, ilia percepto limigita per koncentriĝo je ŝanĝoj ne permesis rimarki ion, kio transpaŝis ilian mondkoncepton.

– Saluton!

– Saluton!

Senŝanĝuloj estis nerimarkeblaj. Ili agadis same kiel la aliaj sed ili estis pli silentemaj, retiriĝintaj. Malfacile estis ne ŝati ilin. Sed ili ne estis tiuj, kun kiuj oni ŝatus iri kinejon aŭ bierumi.

– Kiel vi fartas?

– Bone. Kaj vi?

– Bone.

Ili ripetadis konatajn por ili de jarcentoj konversaciajn skemojn alpropigante ŝanĝojn de terminaro.

– Kion vi faris semajnfine?

– Mi estis ĉe la gepatroj. Kaj vi?

– Karulo, mi...

Ili donis ĝeneralajn respondojn, kiuj estis socie akceptitaj kaj demandis la interparolantojn permesante al ili paroli kaj paroli... La strategio bone funkciis.

Ĉu Senŝanĝuloj sentis la sencon de la vivo? Eble same kiel ni, ŝanĝuloj en plimulto, ili ne tro pensis pri tio. Tiuj pripensoj malbone servas je psika bonfarto ĉar oni povas koncentriĝi je mankoj, kiujn ĉiuj posedas!

Senŝanĝuloj ankaŭ posedas mankojn. Por ili kompreneble ĉefe mankis ŝanĝo. Verdire ili vidis multajn ŝanĝojn ĉirkaŭ si. Aliaj maljunigis, ŝanĝigis kutimoj, pejzaĝoj, vivstiloj. Tamen neniu ŝanĝo okazis en ili. Ili naskiĝis „pretaj”. Ili ne sciis, kie ili naskiĝis ĉar neniu virino povis ilin naski. Ĉu proskripcii ilin iu estaĵo, nur por kio? Senŝanĝuloj ne sentis tion, ke ilian vivon prilumis iu celo. Ili plenigis la tagojn per simpla ĉiutageco. Ili estis nerimarkeblaj elementoj, plejpleje simplaj el la simplaj. Ili estis mezaĝaj, aspektis averaĝe, ordinare. Probable iu vidante ilin povus senti sin pli valora.

Neniuj plilongaj ligoj de Senŝanĝuloj povis daŭri longe ĉar iliaj partneroj post kelkaj jaroj orientiĝis, ke io ne estas normala. Feliĉe la amatoj mem nuligis la rilatojn agnoskante ilin enuaj kaj tro antaŭvideblaj. Komence ilia firmeco ŝajnis granda avantaĝo por la partneroj. Sed tio estis bona. Senŝanĝuloj ne ŝatus vundi ŝanĝulojn. Ili perceptis ilin nestabilaj, spertantaj tro da emocioj. De tempo al tempo tamen Senŝanĝuloj enviis ilin.

De tempo al tempo iu Senŝanĝulo provis eltiri sin el la senŝanĝeco. Li kolorigis siajn harojn, vestis sin ekstravagance. Li ŝatus senti ŝanĝojn tamen ene li estis daŭre la sama.

Tio kio estis, kio estas kaj kio estos – ŝanĝiĝis nur ekstere. Ili ne sentis kunligitajn kun tio emociojn. Ili ne timis morton. Ili ne ekscitiĝis renkontiĝante kun iamaj partneroj post longa disiĝo. Kaj tio, ke ili estas perceptataj „alimaniere” fariĝis por iuj valoro kaj por la aliaj vivcelo. Ili sopiris esti samaj kiel ni, ŝanĝuloj. Por ke tio, kio estis, ne estu nur bildo de la epoko sed plenigita per emocioj parto de ili mem, sentimentalaj pro la juneco, la unuaj amoj aŭ la simptomoj de protestoj. Por ke tio, kio estis, ne estu tiel indiferenta. Senŝanĝuloj ŝatus senti serenon, ĝojon, sed ankaŭ malĝojon, koleron. Ili ŝatus povi reagi aktuale je ĉiuj ŝanĝ-

eblaj cirkonstancoj. Finfine ili ŝatus povi reagi je tio, kio okazos: atendante ĉi tion kun espero kaj samtempe sentante timon.

Tiel ekvilibraj, ili bone toleris streson, premon. Multfoje en la laborlokoj oni ekspluatis ilin tro ĉar ili ĉion transvivis, eĉ ne plendos. Kaj ĉi tio estis vero. La sola frustrado, kiun ili sentis estis kunligita kun ilia propra senŝanĝeco, kun la maleblo eniĝi en vivspertojn, la mondon, cirkonstancojn. Kie ajn ili vivis – ĉie ili estis la samaj. De tempo al tempo ili preterpasis surstrate aliulojn, similajn al ili. De tempo al tempo ili ridetis unu al la alia. Malofte ili eĉ amikiĝis sed ĉiam iliaj interparoloj rilatis al la deziro trarompi la propran stabilecon.

La stabileco troviĝanta en ili fakte malebligis por ili krei ion stabilan. Ili ne povis longe esti en unu loko kaj longe esti kun unu partnero por ne esti suspektataj je la promeso fordoni sian animon al diablo kontraŭ la eterna juneco.

Iuj Senŝanĝuloj akordiĝis kun sia sorto, vivis atendante la finon, kiu ne estis ĝuste antaŭvidebla. Senŝanĝuloj simple malaperis subite sen spuroj. Aliaj trovadis la sencon en ŝanĝiĝemo. Ili observis tion, kio estis malantaŭ ili, kio estis, kio estas kaj kio estos. La realo kiu ilin ĉirkaŭis donis la esperon, ke ŝanĝiĝemo ne regas je ĉiu aspekto de la vivo. Ili daŭre ne sciis kun kiu ili renkontiĝos surstrate. Kie ili loĝos. Kun kiu ili kunlaboros. La necerteco kaŭzis tion, ke ili volis mem provsperti almenaŭ kadre de sia tre limigita repertuaro de la emocioj.

Se vi aŭdas babilaĵon pri eternaj ŝanĝoj, je kiuj vi devas subiĝi ĉar „ĉio estas ŝanĝo” faru same kiel Senŝanĝuloj – koncentriĝu je io tute kontraŭa. Trovu en vi mem ĉiujn stabilaĵojn, kiujn vi posedas ene. Kontrolu tion, kio estis en vi, daŭre estas en vi kaj tion, pri kio vi esperas, ke estos. Vidu vin mem kiel personon stabilan, kiu tamen subiĝas je la tempo-pasado kaj la cirkonstancoj sed ne ĝis la fino ĉar daŭre la persono estas la sama. Kaj en la pensoj montru la langon al tiuj, kiuj timigas Vin per eterna ŝanĝo.

El la pola tradukis Nina Pietuchowska

Bezzienni

Wszystko jest podobno zmianą. Coachowie mawiali, że to co jedyne co pewne w świecie, że zawsze powinniśmy być na nie gotowi i je akceptować. Bo to jak postrzegamy świat zależy tylko od nas. Widać, że ich umysły nie dopuszczają do siebie koncepcji niepodważalnych stałości. A przecież istnieją zasady, które po prostu są, jak prawa matematyczne, są elementem danego świata lub dziedziny. Widać też, że nigdy nie spotkali Bezziennych, a jeśli już spotkali – to ich ograniczona koncentracją na zmianach percepcja nie pozwoliła im zauważyć czegoś, co wykraczało poza ich światopogląd.

– Cześć!

– Cześć!

Bezzienni nie rzucali się w oczy. Robili to co inni, tyle że byli bardziej cisi i wycofani. Trudno było ich nie lubić, ale też nie byli jednymi z tych, których aż chciało się wyciągnąć na piwo czy do kina.

– Jak tam u ciebie?

– Dobrze, a u ciebie?

– Dobrze.

Powtarzali znane im od wieków schematy konwersacyjne, przyswajając zmiany w zakresie słownictwa.

– Co tam robiłeś w weekend?

– Byłem u rodziców, a ty?

– Stary, ja to...

Udzielali ogólnych, społecznie akceptowanych odpowiedzi i zadawali pytania, pozwalając ich rozmówcom mówić i mówić... Ta strategia sprawdzała się doskonale.

Czy Bezzienni odczuwali sens życia? Tak jak my, zmienni, czyli w większości nie bardzo nad tym myśleli. Takie refleksje nie służą zdrowiu psychicznemu, bo łatwo się przez nie skupić na brakach, których przecież nikomu nie brakuje!

Takim Bezzmiennym na przykład również. Oczywiście, brakowało im przede wszystkim zmiany. Co prawda widzieli wiele zmian wokół siebie. Inni się starzeli, zmieniały się obyczaje, krajobrazy, styl życia. Jednak żadna zmiana nie zachodziła w nich samych. Rodzili się „gotowi”. Nie wiedzieli skąd, przecież żadna kobieta nie mogła ich urodzić. Czyżby zsyłała ich jakaś istota, tylko po co? Bezimienni nie czuli, żeby ich istnieniu przyświecał jakiś cel. Wypełniali dni zmiennych codziennością, byli niezauważalnym elementem, najbardziej zwykłymi ze zwykłych. W średnim wieku, o przeciętnym wyglądzie, przeciętnych umiejętnościach. Może patrząc na nich ktoś mógł się dowartościować?

Żadne dłuższe związki Bezzmiennych nie wchodziły w grę, bo przecież ich partnerzy po kilku latach zorientowaliby się, że coś jest nie halo. Na szczęście ukochani zazwyczaj sami z nimi zrywali, uznając ich za nudnych i zbyt przewidywalnych, choć ich stałość na początku здаwała się owym partnerom wielką zaletą. Ale to dobrze. Bezimienni nie chcieli ranić zmiennych. Postrzegali ich jako bardzo niestabilnych, doświadczających tyłu emocji. I czasem tego im zazdrościli.

Czasem jakiś bezimienny próbował się wyrwać. Farbował włosy, ubierał ekstrawaganckie ubrania. Chciał poczuć, jak to jest się zmieniać, ale w środku wciąż pozostawał jednakowy.

To co było, co jest, co będzie – zmieniało się tylko zewnątrz. Nie odczuwali związanych z tym emocji. Nie bali się śmierci. Nie przeżywali ekscytacji spotykając się z partnerem po dłuższej rozłące. Ale i to, że byli postrzegani „inaczej”, co stawało się dla niektórych z nich wartością, a dla innych – nawet życiowym celem. Marzyli by być takimi jak my. By to co było – nie zostawało tylko obrazem epoki, ale przepełnioną emocjami częścią ich samych, sentymentalnym czasem młodości, pierwszych miłości czy przejawów buntu. By to co jest – nie pozostawało takie obojętne. Bezimienni chcieli czuć błogość, radość, ale też smutek czy złość, móc na bieżąco reagować na zmienne okoliczności. Wreszcie – chcieli móc reagować na to będzie: wyczekując tego z nadzieją lub czując obawę.

Tacy zrównoważeni. Tacy dobrze znoszący stres, presję. Nieraz wykorzystywano ich w pracy, bo ci to przetrzymają wszystko, nawet się nie poskarżą. I to była prawda. Jedyną frustracją jaką odczuwali była ta związana z ich własną niezmiennością. Z niemożnością wtopienia się w doświadczenia, świat, okoliczności. Gdziekolwiek nie żyli – byli tacy sami. Czasem mijali na ulicy sobie podobnych. Czasem się do siebie uśmiechnęli. Czasem nawet zaprzyjaźnili, ale ich rozmowy zawsze były takie same i dotyczyły jednego: chęci przełamania własnej stałości.

Wbudowana w nich stałość w gruncie rzeczy uniemożliwiała im zbudowanie czegoś trwałego. Nie mogli zbyt długo pozostać w jednym miejscu czy ze swoim partnerem, by nie zostać posądzonymi o sprzedaż duszy diabłu w zamian za wieczne „jako tako młode” ciało.

Niektórzy Bezzmienni godzili się ze swoim losem żyjąc czekając na koniec, który to akurat był zupełnie nieprzewidywalny. Bezmienni po prostu nagle znikali bez śladu. Inni odnajdowali sens, który trwał w zmienności. Śledzili, to co poza nimi. Co było, jest i będzie. Otaczająca ich rzeczywistość dawała im nadzieję, że stałość nie panuje nad każdym aspektem życia. Wciąż nie wiedzieli, kogo spotkają na ulicy. Gdzie będą mieszkać. Z kim współpracować. Niepewność sprawiała, że chcieli doświadczać, choćby w ramach tego swojego bardzo ograniczonego repertuaru emocji.

Jeśli więc słyszysz gadanie o wiecznych zmianach, którym musisz się poddać, bo „wszystko jest zmianą”, zrób to co Bezzmienni – skup się na czymś przeciwnym. Zobacz wszystkie stałe, które masz w sobie. Prześledź, co było w Tobie, co wciąż jest i co masz nadzieję, że będzie. Zobacz sobie jako stałą osobę, która co prawda poddaje się czasowi i okolicznościom, ale nie do końca, bo wciąż pozostaje sobą. I w duchu pokaż język tym – co Cię straszą wieczną zmianą.

Atendo

Demandoj: Kio estis? Kio estos? Tiaj demandoj atingas tiel altan nivelon de ĝeneraleco, ke pensi pri trovo de respondoj al ili fariĝas amatora filozofado.

Por la demando „kio estis” oni povas serĉi la respondon rerigardante sian vivan pasintecon. Ĉiu konas ĝin kaj revizianta taksas ĝin entute aŭ en fragmentoj kiel bona aŭ malbona. Se la vivo estas ankoraŭ antaŭ ni tio ne ekzistas bezono fermi la pasintecon. Eble, prijuĝante ĝin el la vidpunkto de nuneco multe en ĝi formiĝus alie. Eble iuj eraroj oni povos korekti en venonteco. Tio ĉi estus optimisma rigardo al sia propra biografio.

Jaro 2020 ŝajnas esti turnopunkto en la xx–xxi jarcentoj. Pro la koronaviruso? Ne tute, ĉar la epidemio montris pli grandan malbonon – transiro la sojlon de la elteno de Naturo pri konduto de homaro.

De kiu loko rigardi tion kio estis kaj kio estos? Se vidpunktoj estus ŝtupoj sur la ŝtupetaro de opinio, tiam la plej malsupra estus propra vivo kaj provo juĝi, ĉu ĝi estis bona kaj feliĉa, kaj ĉu ĝi estos pli bona. Se temas pri persona kaj familia sano la tempo pasigita povas esti akceptata kiel nemalbona, kaj espero je bona estonteco povas bazigi sur siaj propraj penoj. Oni povas esti fantaziulo kaj revii pri trafo grandan venkon en hazarda ludo.

Alia vidpunkto estas tio, kio okazis en mia vilaĝo aŭ urbo. Kio ŝanĝiĝis por pli bone kaj kio ŝanĝiĝis por malplibone. Ĉu laŭdi aŭ kondamni

lokajn aŭtoritatojn pro tio, kion ĝi faris aŭ ne faris? Tiamaniere oni jam eniras malgrandan politikon, sed kiel alie imagi al si, kio devas esti kaj kio estos?

Oni povas suprenleviĝi pli alte kaj pensi pri la tuta lando. Kio okazis? Por kiu la situacio okazis bona? Ĉu la agoj de la registaro profitigis min? Kaj por aliaj? Por nacio? Se oni loĝas en la fundo de la socia hierarkio kaj politiko ne turmentas nian kapon, estas malfacile pripensi, kio okazos en lando.

Oni povas pensi eble plej ĝenerale kaj rigardi sur la tuta terglobo kaj la tuta homaro. Precipe nun, kiam la tutmonda koronavirusa epidemio disvastiĝas, en ĉi tiu situacio ni pensas pri la kaŭzo de ĉi tiu plago. Historiistoj memorigas, ke en la pasinteco estis epidemioj de kontaĝaj malsanoj, kiuj senigis la vivon de la loĝantaro de urboj kaj vilaĝoj kaj ruinigis landojn. Hodiaŭ homa civilizo batalas kontraŭ epidemio kaj esperas venki super ĉi tiu malamiko.

Estis kredo je disvolviĝo de universala civilizo en ĉiuj sferoj de vivo. Procentaj kreskorapidecoj fariĝis la objekto de gloro en mondpolitika rivaleco. Malantaŭ komuna scio restigas la milita vetarmado. Tutmonda turismo floris. Ĝia lasta atingo estis grandegaj marekskursaj ŝipoj kun kelkaj miloj da turistoj.

Malmultaj sciencistoj avertas, ke naturaj rimedoj de la terglobo ne estas neelĉerpeblaj, kaj la natura medio ne eltenos la premon de efikoj de homa ekonomio. Bedaŭrinde konsento inter politiko kaj ekologio ne estas ebla. La granda pacifika insulo de rubaĵoj superis la grandecon de Pollando kvinfoje kaj daŭre kreskas. Kiu purigos ĝin? Kio estos? La listo de ekzemploj pri detruado de Naturo estus senfina. Komenciĝis agoj por protekti medion kaj klimaton, sed progreso en ĉi tio ne egalpaŝas kun progreso en detruado de medio kaj klimato. La koronaviruso memorigis homojn, ke el Naturo ne oni povas moki. Ĝi estas la reala reganto de realeco kaj ne homo kun sia grandega sinjoreca fiero.

Filozofoj kaj sciencistoj el diversaj kampoj, kaj ankaŭ ordinaj publicistoj – ĵurnalistoj alcelantaj sensaciojn, estas dividitaj en du

kontraŭajn grupojn: la optimistoj kaj pesimistoj. Optimistoj kredas, je civilizacia progreso, kiu donos ŝancon venki minacojn. Pesimistoj, inverse, profetas pereon sub premo de minacoj, kiuj supozeble kreskos pli rapide ol homa kapablo defendi antaŭ ili.

Kosmologoj supozas, ke ekzistas multaj fremdaj civilizoj en la skalo de la universo, eĉ teknike pli progresintaj ol homa civilizo. Itala fizikisto Enrico Fermi, honorita en 1938 jaro per la Nobel-premio, starigis la demandon: se ili ekzistas kial do ni ne povas trovi spurojn de ilia ekzisto? Malgraŭ multjaraj penadoj, oni ne trovis tian spuron ĝis hodiaŭ. Tiam aperis la demandon: ĉu ni estas la sola civilizo en la universo?

Iuj futurologoj-pesimistoj respondas jes, dum kiam aliaj konfesis eblon de ekzisto de aliaj civilizoj en la kosmo, sed asertas, ke ĉi tiuj civilizoj mortas en iu stadio de sia historio. Surbaze de la minacoj de nenigo de homa civilizo, ili listigas la kialojn: nuklea milito, elĉerpiĝo de naturaj rimedoj, detruo de la natura medio, tutmonda geologia katastrofo, asteroido trafanta la terglobon. Ĉu tio ĉi okazos kaj kio fakte okazos?

Tamen, antaŭ ol iu vadiĝos tiel alte en medito pri la estonteco, plej bone estas komenci serĉi la respondon al la demando „Kio estos?” de la plej proksima ĉirkaŭaĵo. Oni devas rigardi ĉirkaŭen apud si, kion oni povas fari bone kaj el kio malbona oni povas rezigni. Ĉi tie mankas pretaj bonaj konsiloj. Ĉiu pensanto devas trovos nur por si ĝustajn ideojn.

Oni povas rezigni pri la klopodo pensi kio estos kaj pasive submetiĝi al la hazarda kurso de la vivo difinita de la kondiĉoj de viva medio. Ĝi estus simila al sinteno de bestoj, reagantaj instinkte al mediaj stimuloj, sen pensi kio okazos. Homo tamen volas scii, kio okazos. Li trovas profetaĵojn kaj antaŭdirojn. Iafoje oni serĉas ĉi tiun scion en religio aŭ eble ĉe divenisto. Ĉu ĝi estas kondamninda? Jes, se scio pri estonteco el tiaj fontoj malfortigas fidon al la eblo formi ĝin. Scienca futurologio kiel scienco pri antaŭdiro de la estonteco ne taŭgas por antaŭdiri la estontecon de unuobla homo, sed estas pli facile lokalizi estontan sorton dependan de sin.

Pensado pri kio estis kaj kio generas la demandon: kio estas la tempo? La kompreno de tio superas disde eblojn kaj bezonojn de simplulo, kiu scias nur unu fenomenon – li maljunas.

Al la demandoj kio estis kaj kio estos eble respondi per la citaĵo el la fama libro de Sankta Aŭgusteno „Konfesoj” en kiu li respondas: „La ĉeesto de la pasinteco estas memoro, ĉeesto de nuno estas la percepto, ĉeesto de estonteco – atendo”.

Oczekiwanie

Pytania: co było? co będzie? sięgają do tak wysokich wyżyn ogólności, że myślenie nad znalezieniem odpowiedzi na nie staje się amatorskim filozofowaniem.

Na pytanie „co było” można szukać odpowiedzi zaglądając w swoją życiową przeszłość. Każdy ją zna i przeglądając co było ocenia ją całościowo albo we fragmentach jako dobrą albo złą. Jeśli życie jeszcze przed nami to nie ma potrzeby zamykania przeszłości. Może oceniając ją z teraźniejszości wiele w niej ułożyłoby się inaczej. Może jakieś błędy da się poprawić w przyszłości. To byłoby optymistyczne spojrzenie we własny życiorys.

Rok 2020 wydaje się być cezurą w stuleciach xx–xxi wieku. Przez koronawirusa? Niezupełnie, bo epidemia pokazała większe zło – przekroczenie progu wytrzymałości Natury na zachowanie ludzkości.

Z którego miejsca spoglądać na to co było i na to co będzie? Jeżeli punkty widzenia byłyby szczeblami w drabinie poglądu to najniżej stałoby własne życie i próba oceny czy było dobre i szczęśliwe i czy będzie lepsze. Jeśli było zdrowie osobiste i rodziny to przeżyty czas może być uważany za niezły, a nadzieję na dobrą przyszłość można oprzeć na własnym wysiłku. Można być fantastą i pomarzyć o trafieniu wielkiej wygranej w grze losowej.

Inne spojrzenie jest to na to co było w mojej wsi albo w mieście. Co się zmieniło na lepsze, a co na gorsze. Pochwalić czy potępić miejscową władzę za to co zrobiła albo nie zrobiła? To jest już wejście w małą politykę, ale jak inaczej wyobrazić sobie co powinno być i co będzie?

Można wznieść się wyżej i myśleniem objąć cały kraj. Co się działo? Dla kogo było to dobre? Czy działania władzy przyniosły korzyść dla mnie? A dla innych? Dla narodu? Jeśli żyje się na dole społecznej hierarchii i polityka nie zaprzęta głowy to trudno rozmyślać co będzie w kraju.

Można w myśleniu wznieść się najwyżej i spojrzeć na cały glob ziemski i na całą ludzkość. Szczególnie teraz, gdy szerzy się globalna epidemia korona wirusa, to sytuacja skłania do zastanawiania się nad przyczyną tej plagi. Historycy przypominają, że w przeszłości były epidemie zakaźnych chorób, które pozabawiały życia ludność miast i wsi i pustoszyły państwa. Dzisiaj cywilizacja ludzka toczy walkę z epidemią i ma nadzieję na zwycięstwo nad tym wrogiem.

Była wiara w powszechny cywilizacyjny rozwój w każdej dziedzinie życia. Procentowe wskaźniki wzrostu stały się przedmiotem chluby w światowej politycznej rywalizacji. Poza powszechną wiedzą pozostaje militarny wyścig zbrojeniowy. Kwitła globalna turystyka. Ostatnim jej osiągnięciem były olbrzymie morskie statki – wycieczkowce z kilkoma tysiącami turystów.

Nieliczni naukowcy ostrzegają, że naturalne zasoby ziemskiego globu nie są niewyczerpane, a naturalne środowisko nie wytrzyma naporu skutków ludzkiej gospodarki. Niestety między polityką a ekologią zgoda jest nieosiągalna. Wielka pacyficzna wyspa śmieci rozmiarami pięciokrotnie przekroczyła obszar równy Polsce i nadal rośnie. Kto ją posprząta? Co będzie? Lista przykładów niszczenia Natury nie miałaby końca. Zaczęły się działania dla ochrony środowiska i klimatu, ale postęp w tym nie nadąża za postępem w niszczeniu tego środowiska i klimatu. Korona wirus przypomniał ludziom, że z Natury nie można kpić. To ona jest władczą rzeczywistością, a nie człowiek z jego wielkopańską pychą.

Filozofowie i naukowcy z różnych dziedzin a także zwyczajni publicyści – dziennikarze goniący za sensacjami, dzielą się na dwie przeciwstawne sobie grupy, na optymistów i pesymistów. Optymiści wierzą w cywilizacyjny postęp, który będzie dawał szansę pokonywania zagrożeń. Pesymiści, odwrotnie, wieszczą zagładę pod naporem zagrożeń, które mają rosnąć szybciej od ludzkich możliwości obrony przed nimi.

Kosmologowie zakładają, że w skali wszechświata istnieje wiele obcych cywilizacji, nawet technicznie bardziej rozwiniętych od cywilizacji ludzkiej. Włoski fizyk Enrico Fermi, doceniony w 1938r. nagrodą Nobla, postawił pytanie: skoro takie są to dlaczego nie możemy znaleźć jakiegokolwiek śladu ich istnienia? Pomimo wieloletnich wysiłków do dzisiaj na taki ślad nie natrafiono. Pojawiło się zatem pytanie: czy jesteśmy jedyną cywilizacją we Wszechświecie?

Jedni futurologi-pesymiści odpowiedzieli: tak, a drudzy wprowadzili dopuszczalność zaistnienia w kosmosie innych cywilizacji, ale twierdzą, że te cywilizacje na pewnym etapie swoich dziejów giną. Opierając się na zagrożeniach zagładą cywilizacji ludzkiej wymieniają przyczyny: wojna nuklearna, wyczerpanie naturalnych zasobów, zniszczenie środowiska naturalnego, globalna katastrofa geologiczna, uderzenie w ziemski glob asteroidy. Czy to będzie i co z tego będzie?

Jednak zanim się zabierze tak wysoko w rozważaniach o przyszłości może najlepiej zacząć poszukiwanie odpowiedzi na pytanie „Co będzie?” od najbliższego otoczenia. Trzeba rozejrzeć się wokół siebie co można dobrego zrobić, a czego złego zaniechać. Tu nie ma gotowych dobrych rad. Każdy myślący znajdzie tylko sobie właściwe pomysły.

Można zrezygnować z wysiłku myślenia o tym co będzie i poddać się biernie losowemu biegowi życia wyznaczanemu warunkami życiowego środowiska. Byłoby to podobne do postawy zwierząt, reagujących instynktownie na bodźce środowiska, bez rozmyślenia co będzie. Człowiek jednak chce wiedzieć co będzie. Znajduje prorocтва i przepowiednie. Czasem szuka tej wiedzy w religii, a może u wróżki. Czy to naganne? Tak, jeśli wiedza o przyszłości z takich źródeł osłabi wiarę w możliwość

jej ukształtowania. Naukowa futurologia jako nauka zajmująca się prognozowaniem przyszłości, nie nadaje się do przewidywania przyszłości pojedynczego człowieka, ale w jej przewidywaniach łatwiej ulokować swój zależny od siebie przyszły los.

Myślenie o tym co było i o tym co będzie zrodzi pytanie: czym jest czas? Pojmowanie czym on jest przerasta zarówno możliwości jak i potrzeby prostego człowieka, który wie jedno – starzeje się.

Na pytania co było i co będzie można odpowiedzieć cytatem ze słynnej książki świętego Augustyna „Wyznania” w której tak on odpowiada: „Obecnością rzeczy przeszłych jest pamięć, obecnością rzeczy terażniejszych jest dostrzeganie, obecnością rzeczy przyszłych – oczekiwanie”.

Eble iam ni interkompreniĝos

La truo en la ŝtrumpoj de Agnieszka okulumis al ŝi. Senpense juna virino penetris per fingro la truon en malforta reteto kaj tiris ĝin mal-supren malvestigante tiamaniere belforman tibikarnon. La patrino de ĉiam devigis ŝin sekvi la severajn regulojn tamen ŝi de tempo al tempo ŝatis praktiki sufiĉe leĝerajn morojn. Ŝi etendis la manon malantaŭ por malligi la mamtenilon kaj poste, liberigante la mamojn, ĵetis ĝin en la direkto de la kato, kiu tro puŝeme observis sian frivolan posedantinn. Poste ŝi kaŝis sin en ŝvitĉemizon, kiu pro sia grandeco povus servi eĉ kiel tendo. De kie ŝi havis ĝin? Neniam kaj al neniu ŝi volis diri tion.

Metante porteblan komputilon la genuojn ŝi prenis gluton da vodko. Fakte ŝi amis la senton de fajro en gorĝo sed ofte malamis la saman senton pro revenanta al la gorĝo pirozo. Spektante la ekranon ŝi malrapide pensetis petante Dion doni al ŝi interesajn retkonatulojn. Finfine ŝi enŝaltis interretan babilejon kaj komencis krei vortojn, kiuj antaŭ momento estis nur fantomoj sur la klavaro.

aga_zgaga: Hejka, kio nova?

Agnieszka eksentis karesojn de la kato, frotanta kontraŭ ŝia nuda tibikarno.

big_bobby: Bonan tagon

Kun miro la virino alproksimiĝis la vizaĝon al la monitoro. Spektante de diversaj distancoj ŝi ekkonstatis, ke tiu ĉi stranga respondo daŭre restis tie. Rapide ŝi serĉis la nekonatajn vortojn en la Google-serĉilo. Nu jes, Esperanto.

aga_zgaga: Saluton. Kio nova amanto ĉe vi amanto de forgesitaj lingvoj?

big_bobby: Ĉu eble ekzistas ŝanco, ke ni interkompreniĝu en Esperanto?

Agnieszka gardis en kajero memskribitajn valorajn tekstojn, kiuj ŝiaopinie similas al poezio. Nun ŝi ekpensis pri siaj verkoj pritaksante kun kontento, ke ili havas pli altan artan nivelon ol tiu prezentata fare de reta babilanto.

aga_zgaga: Sinjoro poeto, ankaŭ mi verkis en mia vivo kelkajn poemojn. Ili ĉiuj ŝajne estis volapukaj, kvazaŭ ili estus kreitaj en forgesita lingvo de iu pola judo.

big_bobby: Poezio esta lingvo de koro, Esperanto estas lingvo de cerbo. Ili komune povus havi ĉion.

Kaj nun mi kaptis vin ŝajnsaĝulo – ekpensis Agnieszka.

aga_zgaga: Vorto signifas por mi pli ol tremo de voĉkordoj, enigmo inter folio kaj skribilo, eble ilo en kapo, kiu ŝanĝas signojn je signifojn. La afero estas tiel intima, ke „mi amas vin” nur en gepatra lingvo gustas sur lango kiel dolĉaĵo, kiu nutras senceojn. Fremdaj vortoj estas malsekaj: ili gustas kiel folio ne kiel la priskribita sur ĝi rakonto.

big_bobby: Kiu deziras ami per krio kaj flustro devas esti blinda je sonoj. Sed se oni nepre volas difini sin plej bone estas fari tion en Esperanto. Tio ĉi estas kaj pasinteco kaj estonteco de lingvo.

aga_zgaga: Kio okazis, kio okazos?

big_bobby: Kio ne okazis, tio okazos!

Agnieszka alridis la monitoron. Antaŭ ol ŝi komencis respondon kun fascino ŝi serĉis konvenajn vortojn. Momenton poste ŝi skuis nigran ekranon. La virkato observis kun intereso la situacion.

Tomasz ekstaris ĉe la fenestro. Daŭre li pensis pri la enigmo malapero de lia reta parolantino. Similan al ŝi mi nenie trovos – li ekpensis.

En la blokdomo staranta vid-al-vid, tra la fenestro, li ekvidis virinon spektantan la ekranon de la portebla komputilo. Li povis vidi nek ŝian koleron, nek disŝiritajn ŝtrumpojn, nek la katon.

Subite Tomasz eksentis sin tre soleca.

El la pola tradukis Elżbieta Karczewska

Może się kiedyś dogadamy

Dziura w rajstopach Agnieszki puściła do niej oczko. Młoda kobieta bezmyślnie wsadziła palec w otwór cienkiej siateczki i pociągnęła w dół, obnażając przy tym zgrabną łydkę. Matka od zawsze włączała jej do głowy ciężkie zasady, jednak ona lubiła od czasu do czasu praktykować dosyć lekkie obyczaje. Sięgnęła do tyłu, by odpiąć stanik, po czym uwalniając piersi, rzuciła zwiniętym biustonoszem w kota, który zbyt nachalnie przyglądał się swojej frywolnej właścicielce. Następnie schowała się w bluzie, równie dobrze mogącej służyć za namiot. Skąd ją miała? Nigdy nikomu nie chciała powiedzieć.

Wzięła laptopa na kolana i upiła łyk wódki. Kochała uczucie płonącego gardła, chociaż zbyt często również je nienawidziła za sprawą powracającej zgagi. Patrząc na pulpit, nieśpiesznie przesuwiała paciorki myśli, koncentrując się na modlitwie o ciekawe towarzystwo. W końcu odpaliła czat i zaczęła zdecydowanie tworzyć słowa, które jeszcze przed chwilą były jedynie niezrealizowanym potencjałem na klawiaturze.

aga_zgaga: Hejka, co tam słyhać?

Agnieszka poczuła jak o obnażoną łydkę ociera się szukający uwagi kocur.

big_bobby: Bonan tagon

Zdziwiona kobieta przybliżyła twarz do monitora. Jakby nie patrzeć, z każdej odległości, ta dziwna odpowiedź dalej tam była. Szybko wpisała niezrozumiałe hasło w wyszukiwarkę. No tak, esperanto.

aga_zgaga: Saluton. Co tam słyhać, zapomnianych języków nekromanto?

big_bobby: Czy jest może szansa, że dogadamy się w esperanto?

Agnieszka trzymała w notatniku własnoręcznie pisane relikwie, które według niej, ocierały się o poezję. Pomyślała teraz o tych dziełach, przyznając sobie z satysfakcją, wyższy poziom artystyczny niż ten prezentowany przez internetowego rozmówcę.

aga_zgaga: Panie poeto, ja też napisałam w życiu kilka wierszy. Wszystkie podobno niezrozumiałe, jakby stworzono je w zapomnianym języku pewnego polskiego żyda.

big_bobby: Poezja to język serca, esperanto to język rozumu. Razem mogliby mieć wszystko.

I tu cię mam mądralo, pomyślała Agnieszka.

aga_zgaga: Słowa to dla mnie coś więcej niż drżenie strun głosowych, tajemnica między kartką a długopisem czy też narzędzie przetwarzające w głowie znaki na znaczenie. Jest to sprawa tak dalece intymna, że tylko w ojczystym „kocham cię” potrafi rozplýwać się na języku jak słodycz, który karmi zmysły. Obce słowa są suche, smakują kartką, a nie spisana na niej opowieścią.

big_bobby: Kto chce kochać krzykiem i szeptem, ten powinien być ślepy na dźwięki. A jeśli już koniecznie trzeba się artykułować, to najlepiej w esperanto. A oto przeszłość i przyszłość języka.

aga_zgaga: Co było, co będzie?

big_bobby: Co by nie było, to będzie.

Agnieszka uśmiechnęła się do monitora. Zanim zaczęła odpisywać, z fascynacją celebrowała słowa. Chwilę później, pozostało jej tylko potrząsać czarnym ekranem. Kocur przyglądał się z zaciekawieniem całej sytuacji.

* * *

Tomasz stanął przed oknem. W dalszym ciągu roztrząsał tajemnicze zniknięcie swojej internetowej rozmówczynie. Takiej jak ona już nigdzie nie znajdzie, pomyślał.

W bloku naprzeciwko zobaczył kobietę, która wpatrywała się w laptopa. Nie mógł dostrzec jej irytacji, porwanych rajstop ani kota.

Nagle Tomasz poczuł się bardzo samotny.

ÁGNES RÁCZKEVY-EÖTVÖS

Elin

Ĝis la fino de mia vivo mi ne forgesos.

Okazis en la komenco de la 1980-aj jaroj en Budapeŝto.

Sidante sur niaj kutimaj seĝoj en la unua vico ni atendis la Diservon. Maldekstre de mi sidis mia avino, en mia alia flanko mia fratino.

Verŝajne estis iu festo, ĉar multaj homoj venis, kaj la plej multaj haltis kaj salutis mian avinon, la edzinon de la pastoro. Ankaŭ tiu gedza paro venis. Mi konis ilin, plurfoje mi jam vidis ilin, sed nun estis kun ili knabo. Ege stranga knabo.

Ankaŭ ili haltis, kaj dum la gepatroj parolis kun mia avino, la knabo neatendite levis la brakon kaj karesis la vizaĝon de mia fratino. Kiam mi ekvidis lian movon, mi instinkte puŝis min malantaŭen. Nur pro tio mi ne faliĝis surdorsen, ĉar aliaj jam sidis malantaŭ mi kaj ne estis loko fali. En la sama momento mi sentis multajn sentojn. Timon. Naŭzon. Trankviliĝon, ke la knabo ne min tuŝis. Ankaŭ bedaŭron pro mia fratino.

Kaj tiam mi kaptis la rigardon de la patrino. Tiam profundan doloron kaj malĝojon eble mi neniam plu vidis. Faliĝis sur min honto, hontego. Mi estis ĉirkaŭ 13-14-jara.

Estis la unua fojo en mia vivo kiam mi renkontiĝis la sindromon Down.

Paŝis tridek jaroj, mi plenkreskuliĝis, mi lernis disciplini min mem kaj mi lernis multon pri la temo el gazetoj, libroj kaj filmoj, sed tiu malnova historio nenuligeble restis en mia animo.

Verŝajne tion vidis sur mia vizaĝo Carina.

Ni ricevis leteron de la aŭtoritato de la malgranda sveda vilaĝo, kie ni vivas. La letero temis pri la lernejo, kie ekde aŭtuno nia filo lernos. Fakte la unua jaro en la lernejo estas la lasta jaro de la infanĝardeno. Dum tiu ĉi jaro la infanoj jam estas en la konstruaĵo de la lernejo, ke ili ekkonu la lokon por ke la komenco de la lernado ne kaŭzu streson al ili.

Mi kompreneble volis vidi la lernejon, kaj eble ankaŭ alian lernejon, ke mi povu kompari kaj elekti la plej simpatian. La instruistino per granda ĝojo akceptis nin, inter aliaj ŝi rakontis, ke ilia celo estas, ke la infanoj al kutimiĝu al la ritmo de la studhoroj kaj lernopaŭzoj, ke ili lernu pli bone atenti pri siaj aĵoj kaj sur pleto kunporti la tagmanĝon al siaj tabloj. Poste ŝi montris al ni la klasĉambbron, kie inter enviindaj cirkonstancoj ludis la infanoj.

Inter ili unu Down-sindroma knabino.

Malfacile mi taksas la aĝon de la Down-sindromaj homoj, tamen mi supozis, ke la knabino estas pli aĝaj ol la aliaj infanoj.

Carina, nia estonta instruistino kaptis mian rigardon kaj tute mem-nature ŝi diris: „Ŝi estas mia asistantino”.

Mi ankoraŭ nur provis ekkompreni, kion Carina diris, kiam ŝi jam komencis entuziasme klarigi, ke la Down-sindromaj homoj plej ofte nur vere iomete estas mense handikapitaj, samtempe ili estas plenplenaj de amo, kaj Dio certe kreis ilin zorgi pri infanoj. Ili helpas ŝnurigi la ŝuojn, levi la faliĝantajn kraĵonojn, purigi nazetojn. Kaj alie – ŝi aldonis – estas la sperto, ke se la infanoj tiel june renkontiĝas kun tiu ĉi fenomeno, ili trovas tion tute nature kaj kiel plenkreskuloj ili estos multe pli akceptemaj.

Mi nur per mia kapo povis jesi, kaj post rapida adiaŭo jam plorante mi iris al la aŭto. Mi jam ne volis vidi la alian lernejon, mi jam ne volis kompari kaj elekti. Mi ne povis imagi, ke nia filo iru al alia lernejo.

Printempe, kiam ni ricevis la foton pri la klaso, mi fortege atentis, kiam nia filo diris la nomojn unu post la alia – tute nenio ŝanĝo estis en lia voĉo, kiam li montris kaj diris la nomon de Elin.

Post kvar jaroj mia filo demandis min, kial li ne havas fraton. Mi klarigis al li, ke ni gepatroj sufiĉe maljune ekkonis kaj ekamis unu la

alian, kaj ni ĝojegis ke li naskiĝis, kaj li estas perfekte sana. Sed ni ne kuraĝis riski, ĉar se maljunaj virinoj naskas infanojn, estas pli kaj pli granda risko, ke la infano havos malsanon.

Kian malsanon, li demandis.

Ekzemple tiun malsanon, kiun Elin havas.

Mia filo longe pensadis kaj diris: Sed Elin hodiaŭ estis en la lernejo! Se instruisto estas malsana, ne estas en la lernejo. Sed Elin estis tie, do ŝi ne estas malsana.

Vi pravas, mi diris, do ŝi ne estas malsana, ŝi estas stranga.

Nia filo pensante iris al sia ĉambro, sed post kelkaj minutoj revenis kaj demandis: Kial Elin estas stranga?

Laŭ vi ŝi ne estas stranga? reen demandis mi.

Ne, venis la respondo.

Do, certe nur mi vidis ion malbone, mi respondis kun larmoj en miaj okuloj.

Al mi strangis.

Al mia filo ne strangas.

Espereble baldaŭ al neniuj strangos.

Elin

Nie zapomnę do końca życia.

To zdarzyło się na początku lat 80-tych w Budapeszcie.

Siedząc w pierwszym rzędzie na naszych zwykłych miejscach oczekiwaliśmy rozpoczęcia nabożeństwa. Po mojej lewej stronie siedziała babcia, z drugiej strony moja siostra.

Prawdopodobnie było jakieś święto, bo przyszło wiele ludzi. Bardzo wielu z nich zatrzymywało się i pozdrawiało moją babcie – żonę pastora.

Przyszła właśnie i TA para. Znałam ich, widziałam wielokrotnie, ale teraz był z nimi dodatkowo chłopiec. Wyglądał dziwnie.

Również oni zatrzymali się i, podczas kiedy rodzice rozmawiali z moją babcią, chłopiec nieoczekiwanie podniósł rękę i pieszczotliwie dotknął twarzy mojej siostry. Widząc jego ruchy instynktownie rzuciłam się do tyłu. Uniknęłam upadku na plecy tylko dlatego, że za nami siedzieli inni i nie było miejsca. W tym samym momencie przez głowę przeleciał mi huragan myśli. Strach. Uczucie mdłości. Ulga, że chłopiec nie mnie dotknął. Współczucie dla mojej siostry.

I wtedy spostrzegłam spojrzenie jego matki. Tak głębokiego bólu i smutku prawdopodobnie nigdy więcej nie zobaczyłam. Ogarnęła mnie fala wstydu, ogromny wstyd. Miałam wtedy może 13–14 lat.

To był pierwszy przypadek w moim życiu, kiedy zetknęłam się z Zespołem Downa.

Minęło 30 lat. Wydoroślałam i nauczyłam się panować nad własnymi emocjami. Wiele czytałam na temat tej choroby w gazetach, książkach, oglądałam filmy, a stara historia tkwiła jak cierń w mojej pamięci.

Prawdopodobnie dostrzegła to na mojej twarzy Carina.

Otrzymaliśmy list od władz małej szwedzkiej wioski, gdzie żyjemy. Dotyczył szkoły, w której od jesieni miał uczyć się nasz syn. Faktycznie pierwszy rok w szkole był jednocześnie ostatnim w przedszkolu. Aby rozpoczęcie nauki nie było stresem dla dzieci i mogły poznać miejsce przyszłej nauki ten ostatni rok dzieci spędziły już w budynku szkoły.

To oczywiste, że chciałam zobaczyć szkołę, może również inną aby je porównać i wybrać najbardziej przyjazną. Nauczycielka przyjęła mnie z radością. W trakcie rozmowy opowiedziała, że celem pedagogów jest przyzwyczajanie dzieci do rozkładu lekcji i przerw między nimi, troski o własne rzeczy i o noszenie obiadu na tacy do stołów. Później pokazała nam klasę lekcyjną, w której w godnych pozazdrosczenia warunkach bawiły się dzieci.

Wśród nich było dwoje z Zespołem Downa.

Mam kłopot z ocenieniem wieku ludzi z Zespołem Downa, ale odniosłam wrażenie, że dziewczynka jest starsza od innych dzieci. Carina, nasza przyszła nauczycielka, uchwyciwszy moje spojrzenie w sposób naturalny powiedziała: "To moja asystentka".

Próbowałam zrozumieć sens oświadczenia Cariny, która z entuzjazmem zaczęła wyjaśniać, że osoby z Zespołem Downa umysłowo są tylko w niewielkim stopniu upośledzone. Jednocześnie cechuje ich wielka miłość i Bóg z pewnością stworzył je aby troszczyły się o dzieci. Pomagają im zawiązywać sznurowadła, podnosić upuszczane ołówki, wycierać zasmarkane noski. Z drugiej strony – dodała – dzieci, które dostatecznie wcześnie zetkną się z tym fenomenem znajdują sytuację naturalną i jako dorośli mają o wiele więcej zrozumienia.

Mogłam tylko zgodzić się kiwając głową i wyszłam szybko do auta zalana łzami. Już nie chciałam wizytować innej szkoły. Nie chciałam porównywać i wybierać. Już nie mogłam sobie wyobrazić, że nasz syn pójdzie do innej.

Na wiosnę, kiedy otrzymaliśmy grupowe zdjęcie klasy, z wielką uwagą przysłuchiwałam jak nasz syn wymieniał jedno po drugim imiona. Ton jego wypowiedzi nie zmienił się, kiedy pokazał na zdjęciu i wymienił Elin.

Po czterech latach mój syn zapytał mnie dlaczego nie ma brata? Tłumaczyłam mu, że my, jego rodzice, poznaliśmy się i pokochaliśmy kiedy mieliśmy wiele lat. Byliśmy szczęśliwi, że on się urodził i że był absolutnie zdrowy. Nie chcieliśmy ryzykować, że kolejne dziecko może być chore.

Jak to chore? – zapytał.

Na przykład może mieć taką chorobę jak Elin.

Mój syn po długim namyśle powiedział: Ale Elin nie jest chora, bo dzisiaj była w szkole! Jeśli nauczyciel jest chory to nie przychodzi do szkoły. Przecież Elin tam była, a więc nie jest chora.

Masz rację – powiedziałam. Ona nie jest chora, ale jest dziwna.

Nasz syn zamyślony poszedł do swojego pokoju, lecz po kilku minutach wrócił pytając: Dlaczego uważasz, że Elin jest dziwna?

Odpowiedziałam pytaniem na pytanie: Twoim zdaniem nie jest dziwna?

Nie – usłyszałam w odpowiedzi.

Z pewnością odniosłam tylko takie wrażenie – odpowiedziałam mu ze łzami w oczach.

Było mi dziwnie.

Dla mojego syna wszystko było normalne.

Miejmy nadzieję, że wkrótce dla wszystkich będzie to normalne.

Z esperanta tłumaczyła Elżbieta Karczewska

Kompatinda principino

– Ho, kiel bela robo – ekkriis knabinoj kiam Klara eniris klasoĉambron.

– De kie vi havas ĝin?

– Mi ricevis ĝin okaze de mia nomtago. Mia patrino aĉetis la robon en vendejo de fama firmao Vito. Vidu, ties koloroj estas brilegaj kaj ŝanĝiĝas depende de direkto de rigardo.

Klara turnis sin kiel dancistino.

– Sed ĝi estas multekosta ĉu?

– Jes, kompreneble, sed tio ne gravas. Mi ricevis ankaŭ belegan rozan ĉapeleton kun ora rubando. Nun ĝi kuŝas en mia ŝranko. Mi surmetos ĝin ekskursen.

Multaj knabinoj ĵaluzis pri modaj vestaĵoj de Klara. Ŝiaj gepatroj estis riĉaj kaj Klara ŝatis montri tion. Ŝi havis ankaŭ modernan poŝtelefonon kaj de longe portis brilajn ringojn en siaj oreloj. Ŝia vizaĝo estis ornamita per ŝminko, pudro kaj tuĉo sur la brovoj.

Nur du knabinoj en la sesa klaso estis sufiĉe bele vestitaj, por amikiĝi kun Klara. Ili nomis ŝin principino. Jam de pasinta jaro preskaŭ ĉiuj gelernantoj nomis ŝin per la nova nomo. La principino ĉiutage diskutadis kun siaj du amikinoj pri novaj modaj vestaĵoj, novaj harfarboj, ŝminkado de aktorinoj, kaj eĉ pri la plejaspektaj unĝolakoj.

Malgraŭ, temoj de lecionoj ne tre interesis niaj modulinoj, ĉar ili estas enuaj, la knabinoj havis sufiĉe bonajn notojn. Ili ofte antaŭ matematika testo petis Evan klarigi malfacilajn taskojn. Eva estis diligenta lernantino kaj volonte helpis al siaj gekolegoj. Tamen ŝi ne havis multe-

kostajn vestaĵojn kaj modan frizon, kaj tute ne interesiĝis pri aktorinoj. Ŝi ofte estis tre okupita helpante de sia onklino, kiu de multaj monatoj estis malsana kaj ofte kuŝis lite. Verdire ŝi ne estis onklino de Eva, sed estis konatulino de patrino de Eva kaj ŝi nomis la maljunulinon onklino. Eva ĉiutage ordigis ŝian loĝejon kaj aĉetadis bezonajn artiklojn. Ŝi ŝatis aŭskulti rakontojn de la onklino pri antaŭaj vivkondiĉoj de loĝantoj de ilia urbeto. Tiutempe multaj homoj ne havis palton kaj bonan vestaĵon, kaj ĉapojn kaj ŝalojn ŝi mem trikis. La onklino instruis Evan triki kaj ili ambaŭ ĝojis, kiam ŝi mem sukcesis fari koloran koltukon.

Fine de aprilo instruisto de la klaso invitis gepatrojn de la lernantoj por plani lernejan ekskurson al montaro. Dum sekvaj semajnoj en la lernejo inter gelernantoj daŭris diskutoj pri la ekskurso. Knaboj serĉis sur mapo laŭ kiu vojo ili veturos, kion ili vidos dum irado kaj en kiuj urboj haltos por manĝi. La knabinoj parolis pri vestaĵoj, frizoj kaj pri bezonaj etaĵoj, kiujn oni devos preni kun si.

Vendrede la lasta leciono estis matematiko. Instruisto informis la klasanojn pri ekstemporalo, kiu okazos lunde dum la unua leciono. Kion fari, oni devas pretiĝi pri malfacila temo de bildigoj, kaj tio ne facilas. Klara demandis Evan, ĉu sabate ŝi povus helpi ŝin kompreni la malfacilajn taskojn. Eva diris, ke en sabato ŝi havos multe da laboro ĉe la onklino kaj, ke hodiaŭ demandos ŝin, ĉu permesos veni kune kun siaj koleginoj. La maljunulino ekĝojis ekkoni koleginojn de Eva kaj diris ŝerce: – Eble ankaŭ mi lernos pri bildigoj.

Do sabate tuj post matenmanĝo kvar knabinoj prenis siajn kajerojn kaj skribilojn, kaj iris al la onklino.

Unue ili konatiĝis kun maljunulino kaj ordigis kuirejon kaj ĉambbron, poste komencis lerni matematikon. Eva pacience klarigis al siaj koleginoj metodon listigi funkciajn taskojn.

La onklino atente observis la knabinojn. Kiam ili finis matematikajn taskojn la maljunulino proponis ke ili rakontu al ŝi pri sia lernejo. Baldaŭ ŝi eksciis pri venonta ekskurso kaj pri decido de Eva ne ĉeesti la ekskurson pro manko de mono kaj tempo. La aĝa sinjorino sciis, kial

Eva ne havas tempon kaj malĝojis. Poste ŝi demandis Klaran ĉu ŝi estas malfeliĉa.

– Ho, tute ne. – respondis Klara, sed kial vi demandas tion?

– Kaj ĉu vi sentas sin malbela?

– Ne.

– Do kial vi kovris vian belan vizaĝon per farboj kaj pudro? Kial vi pendigis en siaj oreloj tiujn brilaĵojn?

– Ĉar mi volas bele aspekti.

– Sed ĉiuj vidas la farbojn anstataŭ vian vizaĝon. Provu lavi sian vizaĝon kaj rigardu ĝin en spegulo. Eble ĝi ne estas tia malbela.

Ekskurso okazis, Eva, kiu neniam ekskursis, ankaŭ ĉeestis ĝin dank al helpo de la onklino, kaj Klara forĵetis kompleksojn kaj ĉesis ornami sian vizaĝon.

Neniam estis tiel antaŭe.

Nieszczęśliwa księżniczka

– O, jaka ładna sukienka! – zawołały dziewczynki, kiedy Klara weszła do klasy. – Skąd ją masz?

– Dostałam ją na imieniny. Moja mama kupiła ją w sklepie słynnej firmy Vito. Zobaczcie, jak błyszczy i jak zmieniają się kolory, gdy się patrzy z innej strony.

Klara obróciła się jak tancerka.

– Ale ona pewnie kosztowała mnóstwo pieniędzy, prawda?

– Oczywiście, ale to nieważne. Dostałam też piękny różowy kapelusik ze złotą wstążką. Teraz leży w mojej szafie. Włożę go, kiedy pojedziemy na wycieczkę.

Wiele dziewcząt zazdrościło Klarze modnych ciuchów. Jej rodzice byli bogaci, a ona lubiła się tym chwalić. Miała też nowoczesny telefon

komórkowy i od dawna nosiła w uszach błyszczące kolczyki. Jej twarz zdobił makijaż z pudru, szminki i tuszu do rzęs i brwi.

Tylko dwie dziewczynki z szóstej klasy były dość ładnie ubrane by móc się z nią przyjaźnić. Nazywały ją księżniczką i od zeszłego roku prawie wszyscy uczniowie ją tak nazywali. Księżniczka codziennie prowadziła z koleżankami dyskusje na temat modnych kreacji, nowych kolorów farb do włosów, makijażu aktorek i nowych lakierów do paznokci.

Pomimo, że nasze modnisie niewiele interesowały się tematami lekcji, które przecież były nudne, dziewczynki miały dość dobre oceny. Często przed klasówką z matematyki zwracały się do Ewy z prośbą o pomoc w rozwiązywaniu zadań. Ewa była pilną uczennicą i chętnie pomagała innym uczniom w nauce. Nie miała jednak drogich ciuchów, modnej fryzury i zupełnie nie interesowała się modą aktorek. Często była zajęta pomocą chorej ciotki, która od wielu miesięcy prawie nie wstawała z łóżka. Właściwie nie była ciotką Ewy tylko znajomą jej mamy, ale dziewczynka nazywała ją ciotką. Codziennie Ewa sprzątała mieszkanie i robiła zakupy starszej pani. Bardzo lubiła słuchać jej opowiadań o minionych czasach i o warunkach życia mieszkańców ich miasteczka. Wtedy wielu ludzi nie miało płaszcza i porządnego ubrania, a czapki i szaliki ciotka sama robiła na drutach. Nauczyła tego też Ewę i obie bardzo się ucieszyły, kiedy ta zrobiła sobie kolorowy szalik.

W końcu kwietnia wychowawca klasy zaprosił rodziców uczniów do szkoły, aby zaplanować klasową wycieczkę w góry. Przez następane tygodnie między uczniami trwały dyskusje na ten temat. Chłopcy szukali na mapie możliwych dróg, miejsc postoju na posiłek i ciekawych widoków. Dziewczęta rozmawiały o ubraniach, fryzurach i różnych drobiazgach, które należy zabrać ze sobą.

W piątek ostatnią lekcją była matematyka. Nauczyciel poinformował uczniów o klasówce z funkcji matematycznych, która będzie w poniedziałek na pierwszej lekcji. Co robić, trzeba wykuć wszystko o funkcjach, a to nie jest łatwe. Klara zapytała Ewę, czy mogłaby w sobotę pomóc jej w rozwiązywaniu trudnych zadań. Ewa odpowiedziała, że

w sobotę będzie miała dużo roboty u cioci i że dziś zapyta ją, czy może przyjść z koleżankami. Starsza pani ucieszyła się, że pozna koleżanki Ewy i powiedziała żartem, że może nawet nauczyć się funkcji.

W sobotę, zaraz po śniadaniu cztery uczennice zabrały swoje zeszyty i przybory do pisania i udały się do cioci.

Najpierw dziewczynki przedstawiły się cioci i sprzątnęły kuchnię i pokój potem zaczęły się uczyć. Ewa cierpliwie tłumaczyła koleżankom sposób rozwiązywania zadań. Ciocia uważnie przyglądała się uczniom. Kiedy skończyły, zaproponowała, aby opowiedziały jej o swojej szkole. Zaraz dowiedziała się o wycieczce i o tym, że Ewa nie pojedzie z powodu braku czasu i pieniędzy. Wiedziała, dlaczego Ewa nie ma czasu i zasmuciła się. Potem zwróciła się do Klary i zapytała, czy jest niešťczęśliwa.

– Ja? Nie! – odpowiedziała Klara. – Dlaczego pani pyta?

– A czy czujesz się brzydka?

– Nie.

– To dlaczego zakrywasz swoją ładną buzię farbami i tuszem? Dlaczego obwieszasz się błyskotkami?

– Bo chcę ładnie wyglądać.

– Ale wszyscy widzą farbę, a nie twoją buzię. Spróbuj zmyć to wszystko i spójrz w lustro, może nie jesteś taka brzydka.

Wycieczka się odbyła, Ewa, która nigdy nie jeździła na wycieczki, dzięki pomocy cioci również wzięła w niej udział, a Klara odrzuciła kompleksy i przestała się malować.

Tak nie było nigdy dotąd.

Kio okazis, kio okazos?

La pasinta jaro montriĝis ege freneza. Post miaj 2 belaj monatoj, kiujn mi pasis ĉe mia familio kaj post miaj du vizitoj en Pollando (aŭguste kaj oktobre) denove vokis min Hamburgo kaj mia laboro.

Kaj nun? Neniu scias, kio okazos. Eble la kvara ondo? Situacio estas simile stranga. Esperantistoj ekzemple devas renkonti rete. Ankaŭ ĉe mi kaj miaj amikoj, Esperanto dum la tuta jaro ne estis reale parolata, sed estis nur virtuale uzata lingvo. Bone, ke ekzistas telefonaj numeroj por uzi Zoom-on aŭ „Jitsi meet”.

Somero estis ĉiam la tempo por renkontiĝoj. Nun, bonvenon al Virtualujo. La Somera Esperanta Studado (SES) ankaŭ okazis ĉijare virtuale. Multaj esperantistoj nun havas SEZ (Semajnan Esperantozoomadon), aŭ nur aliajn retajn eblecojn.

Sed kiam ni povos denove renkonti en proksimeco? Danci „la Bambon” kaj festi ĝis la nokto aŭ eĉ noktomezo? Jes. Veras, ke kelkaj aranĝoj okazos ĉijare en realo.

Do, ni ĝuu la vivajn renkontiĝojn. Ne gravas, ĉu esperantajn, ĉu viajn privatajn.

Ni esperu, ke venos tempo pli bona. Fartu Vi ĉiuj bone.

Co było, co będzie?

Ubiegły rok był naprawdę szalony. Kiedy minęły 2 miesiące w miłej atmosferze z rodziną i po dwóch wizytach w Polsce (w sierpniu i wrześniu) znów przywołał mnie Hamburg i moja praca.

I co dalej? Nikt nie ma pojęcia co się wydarzy. Może czwarta fala? Np. Esperantyści muszą spotykać się w sieci. Również u nas (w Niemczech) przez cały rok esperanto nie jest językiem używanym w realu ani przeze mnie ani przez moich przyjaciół lecz ogranicza się do wirtualnej rzeczywistości. Dobrze, że można telefonicznie użyć programy „Zoom” albo „Jitsi meet”.

Lato było zawsze czasem na spotkania. Teraz – witajcie w wirtualnej rzeczywistości. Somera Esperanta Studado (SES) również przeprowadzono wirtualnie. Wielu esperantystów ma teraz SEZ (Semajnan Esperantozoomadon – projekt prowadzony poprzez Zoom) albo inne możliwości uczestniczenia tylko zdalnie w projekcie.

Kiedy znów spotkamy się „twarzą w twarz”, „ręka w rękę”? Kiedy znów będziemy mogli tańczyć „La Bamba” i świętować do nocy albo nawet północy? Tak, to prawda. Kilka imprez odbyło się w tym roku w realu.

Tak więc doceniajcie spotkania „twarzą w twarz”. Nie ma znaczenia, czy są to spotkania esperantystów czy Wasze prywatne.

Miejmy nadzieję, że nadejdą lepsze czasy. Pomyślności Wam wszystkim.

Z esperanta tłumaczyła Elżbieta Karczevska

BRANDON SOWERS

Aviadil-modo

La revadon senrevan de Bernardo interrompis ekmovo. Liaj okuloj fiksrigardis la ekranon. Kiom longe jam? Ne pli ol 10 minutoj. Nur ekde kiam oni petis meti aparatojn en aviadil-modo. Kun peno, li devigis sin meti la telefonon en la dorsopoŝon de la antaŭa seĝo.

Li enmanigis la libron kunportitan, malfermis ĝin, sed lia rigardo glitis de la vortoj ĝis la fenestro. La flughaveno etiĝis ĝis malapero. Ĉu iam regrandigota?

Iam li legis teorion, ke flughavenoj estas “ne-lokoj”, senaj je ĉia historieco kaj komunumeco. Tiu ideo ofte revenas dumvojaĝe. Kiel oni do komprenu aviadilojn? Flughaveno sen aviadiloj ĉesas esti “ne-loko” kaj iĝas... kio?

Antaŭpandemie, Bernardo abomenis flugi. Li tamen ĉiam alvenis tre frue. Anstataŭ atendi ĉekaje, li provis trapromeni ĉiun koridoron. La sama recepto, ĉiam: ĉenmanĝejoj, kiĉvendejoj, knedita kun kelkaj “lokaj” butikoj por doni distingon guston.

Sed pli interesis lin la ceter’: strangaj surmuraj muzeetoj pri loka aviadhistorio; kvietaj koridoroj kaŝitaj, kun komfortaj kusenseĝoj kaj elektrokonektoj; artkolektoj rilatantaj al nenio.

Li makzelumis por bremsi la oreldoloron dumascendan. Ĉirkaŭrigardante, li vidis, ke preskaŭ ĉiuj jam spektas propran filmon. Ĉu estis strange, li demandis sin, senti nostalgion pri la tempo, kiam unu filmo estis projekciita por ĉiuj, kaj ĉiuj spektis ĝin kune, vole-nevole? Tio estas, pri tempo, kion li mem apenaŭ travivis?

Dumfluge, li ofte spertis strangan senton. Ne pri timo temis. Ne ekzakte. Estis kvazaŭ la neeblo komuniki kun konatoj dum la flugo signifis, ke li provizore ĉesas ekzisti. De jaroj, li aparte mesaĝemis antaŭfluge, por prokrasti kiom eble tiun senton.

Sed, ĉi-foje, li havis nenion por sendi. Li ja ĵus adiaŭis preskaŭ ĉiujn siajn karulojn.

Bernardo ĵetis rigardon denove telefonen. Dum preskaŭ jaro, li ne ricevis mesaĝojn de lia antaŭa vivo. Li apenaŭ povis mensbildigi, kio atendos lin. Eble li ne volis.

Li pensis pri tiuj, de kiuj li ion ricevi plej volis – kaj plej timis. Li pensis pri la neatendita mesaĝo pasintsilvestre ricevita. La rezulta krizo almenaŭ helpis lin finfine demeti de si la antikvan Adamon.

Spite oftan cerboĵongladon, lia masivo esprimenda restis kafka kastelo, kuŝanta ĉiam horizontrande. Dum li paŝis, grimpis, kaŭris al ĝi, lin ĉirkaŭis, sufokis kaj stumbligis la ombroj de liaj iamuloj. Li iam konstatis, ke sen la nutro de lia atento, ili komencos ekmalĉeesti. Ke li nur ekzorcos la fantomojn aplikante sian forton por atingi la kastelon.

Bernardo ĵetis rigardon denove al la poŝo kie kuŝis la telefono. Li konstatis, ke li duonfantazias pri mesaĝoj ricevotaj. Sed ne plu gravis al li, ĉu atendos lin io aŭ ne. Homo kiu perdis sian lokon en la universo, kaj, spite ĉion, ĉarpentis por si novan, neniam denove perdos ĝin.

...

Subita skuiĝo surprizvekis Bernardon el duondormo pretervola. Skuiĝo denove – kaj li komprenis ke ili revenas al la tero.

Kun granda, trankvila enspiro, Bernardo etendis la brakon, kaptis la telefonon, kaj ekŝaltis ĝin.

Tryb samolotowy

Beznadziejne snucie marzeń Bernardowi przerwał jakiś ruch. Jego oczy wpatrywały się w ekran. Jak długo? Nie więcej niż 10 minut. Od tego momentu, gdy poproszono wszystkich pasażerów o przełączenie telefonów na tryb samolotowy.

Z trudem zmusił się na odłożenie telefonu do kieszeni fotela przed nim. Wziął do rąk książkę zabraną na podróż, otworzył ją, lecz jego spojrzenie wędrowało od słów w książce do okna samolotu. Lotnisko stawało się co raz mniejsze, w końcu stało się niewidoczne. Czy kiedyś ponownie stanie się duże?

Kiedyś czytał teorię, że lotniska są „nie-miejscami” bez historyczności i wspólności. Teoria ta często powracała podczas podróży. Jak więc można zrozumieć samoloty? Lotnisko bez samolotów przestaje być „nie-miejscem” i staje się czym...?

Przed pandemią Bernard brzydził się lataniem. Jednak zawsze wcześniej był na lotnisku przed odlotem. Zamiast oczekiwać spokojnie na swój lot przy wejściowej bramce on zawsze próbował przejść się po wszystkich korytarzach. Zawsze odwiedzał wszystkie lotniskowe punkty gastronomiczne, różnorodne punkty sprzedaży, sklepy i sklepiki tworzące charakterystyczny lotniskowy klimat.

Jednak najbardziej interesowało go co innego: dziwne ścienne obrazy pokazujące historię lotnictwa, ciche ukryte korytarze z wygodnymi miejscami do siedzenia i elektrycznymi gniazdkami, dziwne kolekcje sztuki bez określonego tematu.

Bernard zacisnął szczęki, aby zahamować ból uszu spowodowany wznoszeniem się samolotu. Rozglądając się dookoła zauważył, że prawie wszyscy już oglądają własny film. Czy to jest dziwne, zapytał sam siebie, czuć nostalgię do czasów, kiedy jeden film był wyświetlany dla wszystkich i wszyscy chcąc nie chcąc go oglądali? To jest o czasie, który on ledwie przeżył?

W czasie lotu często doświadczał on dziwnych odczuć. Nie chodziło o strach. Nie dokładnie o strach. Ta niemożność kontaktu ze znajomymi w czasie lotu oznaczała dla niego prowizorycznie, czasowe zaprzestanie istnienia. Od wielu lat przed lotem wysyłał wiadomości, aby odwlec na tyle, ile to jest możliwe to odczucie.

Ale tym razem nie miał nic do wysłania. Wszak dopiero co pożegnał prawie wszystkich swoich bliskich.

Bernard ponownie spojrzął na swój telefon. Od prawie roku nie otrzymywał wiadomości ze swego poprzedniego życia. Zaledwie mógł wyobrazić w myślach to, co go czeka. A może nie chciał tego wyobrazić.

Myślał o tych, od których bardzo chciałby otrzymać jakąś wiadomość – i bardzo się bał. Myślał o nieoczekiwanej wiadomości otrzymanej podczas minionego sylwestra. Powstały w wyniku tego kryzys pozwolił mu na zrzucenie z barków antycznego Adama.

Wbrew częstej umysłowej żonglerce jego stan fizyczny najlepiej wyrażał kafkowski zamek leżący horyzontalnie na boku. Podczas gdy on szedł, wspinał się, szykował się do skoku otaczały go, dusiły, wytrącały z równowagi cienie jego zmarłych bliskich. Któregoś razu zauważył, że bez karmienia się jego uwagą zacząną odchodzić. Że będzie tylko wyganiał duchy stosując swoją siłę, aby dotrzeć do zamku.

Bernard znowu zajrzał do kieszeni, w której leżał telefon. Stwierdził, że zaczyna fantazjować na temat wiadomości, które otrzyma. Ale nie było już dla niego ważne go, czy coś go czeka, czy też nie. Człowiek, który stracił swoje miejsce we Wszechświecie, a mimo to wyciosał sobie coś nowego, nigdy więcej tego nie straci.

...

Nagły wstrząs niespodzianie wyrwał Bernarda z niezamierzonego snu. Ponowny wstrząs – i zrozumiał, że wracają na ziemię.

Z mocnym, spokojnym wdechem Bernard rozpostarł ramiona, chwycił za telefon i włączył go.

Z esperanta tłumaczyła Nina Pietuchowska

Kiel en spegulo

Tiuvespere, ĉio devintus esti perfekta.

Viola estis invitita prezenti sian unuan romanon, *Kredi*, ĉe la Instituto pri Itala Kulturo en Lisbono, urbo al kiu ial ŝi sentas sin aparte ligita.

La kolektiva scivolema atendo spirebla en la salono estis tre emociga, des pli ĉar komence neniu kredis je la verktalento de Viola. Tamen, la pluraj agnoskoj kiujn ŝi ricevis de la itallingva verkista komunumo dementis ĉiujn. Kiam ŝi ekverkis sian unuan romanon, la paĝoj fluis tute nature kaj aŭtente; ĝia franca ĉefrolulo estis tiom tridimensia, ke li nur atendis esti elplumigita.

Finfine, ŝi povis publike prezenti lian prisman personecon, liajn travivaĵojn, lian interlinian, nesolvitan spiritan itineron. La misteraj trajtoj de Hiacinto, lia duvizaĝa naturo, tuj kaptis la legantojn. Ĉu li estas anĝelo aŭ demono, ĉu frenezulo aŭ trompulo, Viola neniam malkaŝos: lia ambigueco estas lia plej fascina trajto.

Tiuvespere, Viola estis brila. Ĝis tiam.

Ĝis kiam oni demandis al ŝi pri ŝia infanaĝo, kaj ĉu ĝi iel influis ŝian verkadon.

Viola tuj ekrakontis pri la barka skulptaĵo al kiu ŝi ĉiam gapis kiam ŝi estis infano, pri la mistera etoso kiun ŝi spiris en la Tulona katedralo, pri la kraniaj relikvoj de Johano Kasiano ĉe la abatejo de Sankta Viktoro en Marsejlo, pri la spirita elano de fervoraj kredantoj, kiuj arde brakumis statuojn de sanktuloj kaj konfidis al ili, kun larmoplenaj okuloj, siajn problemojn. Jes, ĉio ĉi certe influis ŝian verkadon.

Perpleksaj rigardoj akceptis ŝian rakonton. Ŝi ne tuj komprenis, kio okazas.

La direktoro de la Instituto ridete laŭdis la verkistinion, kiu jam tiom ruze uzas tiajn trukojn por malpermesi, ke la publiko eniru la sekretojn de ŝia ateliero. Tamen nun, ŝi rakontu almenaŭ ion al la scivolema publiko: kia estis ŝia infanaĝo en Italio?

Viola ridetis, por ne malkaŝi, ke tia respondo tute ne estis intenca. Ŝi tuj ekserĉis kelkajn signifajn anekdotojn el sia infanaĝo; tamen, ŝi trovis nenion en sia memoro. Kiam ŝi klopodis ion elfosi, revenis al ŝia menso nur la rakonto pri la infanaĝo de Hiacinto.

Silento falis sur la salonon, kiel sorĉo. Ŝi strebis kaŝi sian panikiĝon, sed eble ne tiom sukcese; la direktoro denove helpis ŝin kaj ekdialogis pri la romano kun la publiko.

Post la prezento, Viola aŭtografadis ekzemplerojn de sia romano, kiel aŭtomato. Venis pluraj gratuloj. Ŝi ne pardonpetu, certe temas nur pri laceco, afable ridetis la direktoro.

Kiel eblas, kiel, Viola pensas nun, rigardante sian lacan vizaĝon en la hotelĉambra spegulo.

Memormankoj ja povas okazi, sed rakonti tiom lucide elpensitan infanaĝon de elpensita persono ne estas normala afero. Jes, ŝi ja estis kaj en Tulono kaj en Marsejlo, sed tio neniel povas pravigi kontaktoperdon kun propraj memoroj.

Perdi memorkapablon angorigas ŝin, ekde ĉiam. La vakua rigardo de ŝia avino foje hantas ŝin en koŝmaroj. La memoroj de ŝia avino neripareble pereis, antaŭ ŝia korpa forpaso. Ofte Viola iluziiĝis, ke per verkado io saveblas de porĉiama forgeso, sed verkado entute estas mensogo. Eble iam eĉ la restaĵoj de tiuj palaj ombroj – agnoskataj de Viola kiel siaj memoroj – forvaporiĝos, ajna konscilumo vanuos, kaj ŝi rigardos la memorojn de sia ĉefa fikcia persono kiel proprajn. Kie estus la diferenco?

Verku ĝis kiam io vere doloros vin, ŝi kutimas diri, eĉ al si mem, ĝis kiam io vere bruligos vin. Verku kvazaŭ via misio estus forŝteli la dian fajron. Sed ne eblas alproksimiĝi al io malpermesata. La aroganteco ĉion

malkovri, ĉion scii, ĉion kompreni, estas pereiga: ĝi estas la radiko de ĉia malbono. Eble tiu ŝia memorinterrompo estas averto: la plej intimaj vivmisteroj ne estas ludiloj, kiujn oni rajtas malmunti por malkovri kiel ili funkcias.

Abrupte, ŝi ekvidas ion en la spegulo, malantaŭ si.

Estas blonda fantomo, etera kaj lumoplena kiel cigno, kun akvamarinaj, melankoliaj okuloj.

Estas li. Hiacinto. Ŝia spegula kopio, ŝia negativo, plursence, sed samtempe ili estas tiom proksimaj, tiom intime ligitaj. Interalie, ili ambaŭ nomiĝas kiel floroj.

Ŝi volus alparoli lin, ricevi respondojn, sed la konturoj de lia bildo tuj ekfluktuas, kiel sub akvosurfaco.

“Kiel en spegulo, konfuze”. De kie venas tiuj vortoj, ŝi ne memoras, kaj ŝi ne certas, ĉu temas pri ĝusta citaĵo. Ne gravas. La fantomo de Hiacinto intertempe komplete malaperis.

La postan matenon, forlasinte nokton plenplenan je nekapteblaj fatamorganoj, Viola promenas tra Lisbono. Senpripense, ŝi alvenas al la preĝejo de la Karmela monaĥejo, kaj revidas ĝiajn ruinaĵojn: tertremo faligis la tegmenton, sed ĝia pintarka gotika skeleto pretervivis la katastrofon. La kontrasto inter la blinda natura forto kaj la persisto de homaj inĝeniaj spuroj ĝisfunde skuis ŝin antaŭ jaroj, kaj tiuj ruinaĵoj nun reekflamigas ŝian imagon. Eble iam ankaŭ ŝia menso subite disfalos kiel tiu preĝejo – aŭ eble tio okazos malrapide, kiel mozaiko kiu laŭgrade perdas siajn ŝtonetojn – kaj nur fragila spuro postvivos. Demandoj pri la estonteco turmentas ŝin.

“Kiel en spegulo, malhele”. Fakte ne, nek “konfuze”, kiel ŝi memoris antaŭ la hotelĉambra spegulo, nek “malhele”, kiel ŝi memoras nun, sed “enigme”. Jes, la originala teksto parolas pri enigmo.

Iam la vero senvualiĝos. Iam.

De kie venas tiuj vortoj, Viola ne sukcesas memori, kaj ŝi ne certas, ĉu estas ŝiaj memoroj aŭ tiuj de Hiacinto. Ne gravas.

Ŝi plukontemplas la ruinaĵojn, la bluan ĉielon super ili, kaj ridetas.

Jakby w zwierciadle

Tego wieczora wszystko miało być doskonałe.

Wiolę zaproszono na prezentację jej pierwszej powieści, *Uwierzyć*, do Instytutu Kultury Włoskiej w Lizbonie – mieście, do którego z jakiegoś powodu czuła szczególne przywiązanie.

Dające się odczuć na sali zbiorowe, przesyczone zainteresowaniem oczekiwanie było przejmujące, tym bardziej, że z początku nikt nie wierzył w talent pisarski Wioli. Jednakże liczne dowody uznania, które otrzymała od włoskojęzycznej wspólnoty pisarzy, zaprzeczyły wszystkiemu. Kiedy rozpoczęła tworzenie swojej pierwszej powieści, strony wypełniały się wręcz naturalnie i autentycznie; jej główny bohater, Francuz, był tak trójwymiarowy, że tylko czekał, aż pojawi się na kartce.

Nareszcie mogła zaprezentować jego wielobarwną osobowość, jego doświadczenia, jego wyrażoną między wierszami, nieobjaśnioną drogę duchową. Tajemne przymioty Hiacynta, jego dwulicowa natura, wnet ujęły czytelników. Czy jest on aniołem, czy demonem, szaleńcem, czy oszustem, Wiola nie zdradzi nigdy: wieloznaczność jest jego najbardziej fascynującą cechą.

Tego wieczora Wiola promieniała. Do czasu.

Dopóki nie spytano jej o dzieciństwo oraz o to, czy w jakiś sposób wpłynęło ono na jej twórczość.

Wiola wnet opowiedziała o barkowej rzeźbie, w którą zawsze wlepiła wzrok w dzieciństwie, o tajemniczej atmosferze, którą wdychała w katedrze w Tulonie, o relikwii – czaszce Jana Kasjana w Klasztorze Świętego Wiktora w Marsylii, o duchowym zrywie gorliwych wiernych, którzy w zapale obejmowali figury świętych i zawierzali im, z oczami pełnymi łez, swoje problemy. Tak, wszystko to oczywiście wpłynęło na jej twórczość.

Zakłopotane spojrzenia przyjęły jej opowieść. Nie od razu zrozumiała co się stało.

Dyrektor Instytutu z uśmiechem chwalił pisarkę, która tak sprytnie wykorzystuje sztuczki uniemożliwiające publiczności wykradanie sekretów jej warsztatu. Ale niech już wreszcie opowie choć trochę ciekawej publiczności: jak wyglądało jej dzieciństwo we Włoszech?

Wiola uśmiechnęła się, aby nie zdradzić, że taka odpowiedź zupełnie nie była zamierzona. Wnet zaczęła szukać w pamięci kilku sensownych historyjek z dzieciństwa; ale niczego takiego nie znalazła. Kiedy starała się coś wygrzebać, w jej w myślach powracała jedynie opowieść o dzieciństwie Hiacynta.

Milczenie opanowało salę niczym zakłęcie. Próbowwała ukryć panikę, ale chyba bez zbytniego powodzenia; dyrektor znów jej pomógł i nawiązał z publicznością dialog na temat powieści.

Po prezentacji Wiola podpisywała egzemplarze swojej powieści niczym automat. Złożono jej liczne gratulacje. Niech nie przeprasza, to na pewno tylko zmęczenie, uprzejmie uśmiechał się dyrektor.

Jak to możliwe, jak, myśli Wiola teraz, patrząc na swoją zmęczoną twarz w lustrze pokoju hotelowego.

Luki w pamięci w końcu mogą się zdarzać, ale tak świadome opowiadanie dzieciństwa zmyślonej osoby nie jest sprawą normalną. Tak, była przecież i w Tulonie, i w Marsylii, ale nijak nie uzasadnia to utraty kontaktu z własną pamięcią.

Utrata umiejętności zapamiętywania przeraża ją, od zawsze. Puste spojrzenie babci czasem straszy ją w koszmarach. Pamięć babci nieodwracalnie przepadła zanim odeszło jej ciało. Wiola często łudziła się, że dzięki twórczości da się coś ocalić z wiecznego zapomnienia, ale twórczość sama w sobie jest kłamstwem. Może kiedyś nawet resztki tych bladych cieni, które Wiola uznawała za swoje wspomnienia, wyparują, jakikolwiek promień świadomości zgaśnie, a ona będzie uznawała pamięć swojego fikcyjnego głównego bohatera za swoją. Gdzie jest różnica? Pisz, aż coś cię naprawdę zaboli, zwykła mówić, nawet dla siebie, aż coś naprawdę cię spali. Pisz, jakby twoją misją było wykradnięcie boskiego ognia. Ale nie można się zbliżyć do czegoś zabronionego. Pycha skłaniająca do odkrycia, poznania, zrozu-

